

ESPERANTO


★ TRIUMFONTA ★

N-ro 3-4, 28. Aug. 1920

Jurnalo internacia, universala, sendependa
eldonata de Teo Jung, Köln-Horrem (Germ.)

Prezo 3 Resp.-Kup.

Speciala Numero por la Foiro de Frankfurt a. M.



Frankfurt a. M. kiel Foirurbo.

Komerco kaj trafiko jam ĉiam estis la akcelantoj de paca rilatoj interpopolaj. La kuna laboro alproksimigis la unujn al la aliaj.

La paco kreis al ni novajn taskojn. Novaj problemoj devas esti solvotaj. Unu el la plej gravaj taskoj estas la restarigo de la komercaj rilatoj; per ili estas akcelata la internacia interŝanĝo de komercaĵoj. Neniu ŝtato povas vivi sen la alia. Ĉiuj devas reciproke sin helpi.

Jam en antikvaj tempoj la lokoj por koncentrigi la komercan vivon estis la foiroj. Kompreneble ili estis aranĝitaj tiutempe laŭ tute alia vidpunkto. Oni ja ne ankoraŭ havis la modernajn helpilojn, kaj cetere la komercado okazis en tute aliaj formoj.

La foiroj ekestigis el la malgrandaj merkatoj, kiuj estis aranĝitaj okaze de ekleziaj festotagoj. Tiam granda amaso da homoj venis en la urbon por ĉeesti la ceremoniojn. Tio estis bona okazo por la komercistoj vendi la komercaĵojn. Oni kunvenis je certaj lokoj, kie la komercaĵoj estis elmetitaj.

El tia aranĝo, iam verŝajne malgranda, naskiĝis ankaŭ la *Frankfurtaj Foiroj*. Longaj kolonoj de veturiloj peze ŝarĝitaj venis eĉ de malproksime al Frankfurt; komercistoj kaj metiistoj provis vendi la produktaĵojn. Dum la foirtagoj regadis vigla kaj impresa vivo. La enloĝantoj eliris multajn gajnon el la foiroj. Kaj la realaj profitoj verŝajne iĝis ĉi tiu flankenlasita nenion por fortiĝi la ekonomian bonfamon de la foiroj.

Frankfurto baldaŭ atingis la unuan rangon. Specialaj rilatoj kaj privilegioj helpis al ĝi pli grandigi sian signifon. La urbo fariĝis la centro de tuta Eŭropa komerco, kaj oni nomis ĝin „la patrino de ĉiuj komercaj metioj“.

La malnovaj foiroj estis veraj foiroj de komercaĵoj. Al ili venis la komercistoj kun ĉiuj produktaĵoj, kun la tuta provizo, kiun ili volis vendi. Kaj ili restis tiel longe, ĝis kiam ili estis ĉion vendintaj. La tuta aranĝaĵo nature estis iom komplika. Tamen ni komprenas, ke la komercaĵaj foiroj konserviĝis tiom longatempaj kiel instalaĵoj de la komercaĵa interŝanĝo, ĉar ili ebligis parte solvi la problemon de la trafikaj malhelpaĵoj. Per la pli grandiginta perfekteco de la trafiko kaj ĉefe per la pli graviginta signifo de la fervojoj la valoro de la komercaĵaj foiroj perdiĝis. Ankaŭ la foiro de Frankfurt konsekvence perdis de sia impresado kaj signifo. La rapideco, per kiu oni povis moviĝi de loko al loko dum proporcie mallonga tempo pere de la „vaporŝtato“, estis tiom alloga, ke la komercaĵa interŝanĝo ne plu estus povinta koncentrigi ekskluzive en la foiroj. Iom post iom la komercaĵaj foiroj estis puŝataj al la fundo aŭ daŭrigataj en tre modesta amplekso.

Tuj post la milito reviviĝis la memoro pri la antikvaj foiroj de Frankfurt. Oni konsideris ilin bonaj modeloj por nova aranĝaĵo en moderna formo. Simila entrepreno jam ekzistis en Leipzig, kie deposit kvarona jarcento koncentriĝis la internacia foirtrafiko. Per la nova situacio, kaŭzita el la cirkonstancoj ŝanĝigitaj per la milito, aliĝis la signifo de Frankfurt kiel foirurbo en la Okcidento. Eminentaj anoj de la komerca sfero unuigis sin por efektiviĝi la planon. La preparoj baldaŭ maturiĝis. Jam en somero 1919 oni povis inviti al la unua foiro: „Internacia Importfoiro de Frankfurt a. M.“ Ĝi okazis de la 1-15 Oktobro 1919. Ĝi sukcesis komplete kaj kunevenigis imponan amason de en- kaj eksterlandaj komercistoj. La necesa plifortigo de la Germana komerca vivo kaŭzis

grandegan intereson por la juna entrepreno. Jam ĝi povis akiri la simpatian de ĉiuj komercistoj, kiuj antaŭvidis bonegan perspektivon por estontaj aranĝaĵoj.

La unua foiro kompreneble ne ankoraŭ estis perfekta. Mankis ankoraŭ kelkaj organizaj avantaĝoj, kiujn sole la praktiko lernigas. Ĉiokaze la unua foiro estis bona fundamento, sur kiu oni povis daŭrigi la laboron por la akcelado de paca instalaĵo.

La foiro de Frankfurt estas aranĝataj de la „Foiraj Ekspozicia Kompanio“ kune kun la urba magistrato, la Komercambro, industriaj kaj komercaj ligoj ktp. La kompanio havas konsilantaron konsistantan el gvidantaj membroj de la komunuma administraro, de industrio kaj komerco. Oni ne devas forgesi, ĉi tiu ĉi tie la specialan societon „Foiraj Unuiĝoj“. Ĝi konsistas el aro de gvidantoj en la Germanaj industrio, komerco, arto kaj gazetaro kaj helpas la celojn de la foiro por igi Frankfurton angula pilaŝto de la Germana ekonomio.

La organizado mem de la foiro estas prizorgata de la Foiroficejo (Messami), granda kontora aparato, kiu nun troviĝas en speciala domo.

Post kiam la unua foiro estis aranĝita, multaj similaj okazis ne sole en Germanujo, sed ankaŭ en la eksterlando. Oni povis baldaŭ paroli pri internacia foir-epidemo, manio, kiu kreis foirojn pri multaj pli-malpli taŭgaj lokoj. La nombro de la foiroj kaj foiretoj fiam kreskis, ke la ĝenerala intereso pri ili iom malgrandiĝis.

Malgraŭ tio la „Messami“ povis aranĝi la duan foiron, okazintan de la 2-11 Majo 1920, kiu ne malpli bone sukcesis, kvankam la Germana ekonomia vivo ĵus travivis gravan krizon.

Je la tria fojo Frankfurto nun invitas al la partoprenado kaj vizito de la

3-a Internacia Foiro de Frankfurto apud Majno okazonta de la 3-9 Oktobro 1920.

Konforme al la programo de la foiroj de Frankfurto ankaŭ ties celo estas:

**Importo kaj Eksperto,
akcelado kaj rekonstruado de la internacia
interŝanĝo de komercaĵoj.**

La ampleksa kaj bone vizitita printempa foiro de Frankfurto a. M. ĝuigis gravan novacon. Ĝis tiam la foir-adresaro estis la sola ilo por orientiĝi sin en grandaj foiroj. El la komercaĵa registro la aĉetisto povis konsulti la fabrikestojn de siaj artikloj. Tamen li devis serĉi ilin mem en standoj malproksimaj unuj de la aliaj, en konstruaĵoj dislokitaj en la tuta grandurbo. Tiamaniere neniu povis fari al si precizan imagon pri la tuta aranĝo. Aĉetantaj eksterlandanoj, kiuj nek konis la lingvon nek la urbon, tial estis dependaj de la bonŝanco.

Per la laŭbranca grupo de la ekspoziciaĵoj, en Frankfurto aplikita la unuan fojon en grandfoiro, oni atingis progreson, kiu ne sole havas signifon por la sukceso de la Frankfurtaj foiroj, sed eĉ donas al ili la karakteron de grandborsoj farantaj kaj reguligantaj prezojn.

La komitato starigis diversajn servojn por plejble faciligi la viziton de la foiroj. Eksterlandaj vizitantoj povas havigi al si sen grandaj formalajtoj la pasporton per la ataŝeo, ambasadoroj, aferistoj, ĝeneralkonsuloj, konsulejoj aŭ pasportkontoroj Germanaj.

La „Foirekspeda Kompanio“ zorgos pri la rapida kaj certa alportado de la komercaĵoj.

Por eviti la partoprenadon de neseriozaj aliĝemuloj, speciala komisiono subtenata de la Komercambro kaj fakdelegacioj prizorgos la ekzamenadon de la aliĝoj.

La ampleksa specimena ekspozicio havos 29 ĉefgrupojn kaj diversajn subsekciojn. (Komparu la enpresitan anoncon!) Ili loĝigos en 17 domoj ĉirkaŭ la impona festhalo kaj proksime al ĝi.

Rimarkinda novaĵo en la Frankfurtaj foiroj estas la aliĝo de specialaj fak-foirejoj. Tiamaniere oni ekzemple instalos propran fakon por la **tabak-industrio**. Ĝi ankaŭ okupiĝos pri la sub-industrioj, ekzemple fabrikoj de maŝinoj por cigaredoj, porvolvaj prem-aparatoj, enpakigiloj ktp.


Interesuloj pri arto atentos la riĉan **arto-ekspozicion**, al kiu aliĝos speciala aŭkcio de artaj objektoj sub la kontrolo de fak-eksperto.

Vastan spacon havos la **grafika branĉo**.

LA INDUSTRIO DE FRANKFURTO KAJ ĈIRKAŬAĴO.



BORSO.



ĈEFA STACIDOMO.



FESTHALO.

Frankfurto a. M. kuŝas en baseno limigata de 4 montaroj kaj en la teritorio de tre intensa industria evoluto. La urbo, iam ekskluzive komerca kaj borsa loko, fariĝis la sidejo de ampleksa industrio. Ĝi konkredis al si signifon, kiun oni devas admiri, konsiderante, ke la lando ja estas riĉa de homoj kaj terferoj, sed malhavas krudmateriaĵojn, kiuj nur devas esti alportataj.

La kondiĉoj kaj kalfiĝo de la fonda de la ĉefa industrio estas diversaj. La tre favora transporto-situaĉio ĉiel helpis la organizon. La akvaj vojoj faciligis la alkondukon kaj alporton de amasartikloj, karboj ktp., dum la fervoja transporto al ĉiuj direktoj donas bonan okazon por la fardono de la produktado. La teritorio apartenas al la plej dense loĝata de Germanujo; la loĝantaro estas monhava. Kiam oni fondis la industriojn, oni instalas ĝin laŭ la konsumo. Tiel fondiĝis ekzemple tie ĉi kaj en la ĉirkaŭaĵo luksa industrio, kiu floregis, kiam poste la tuta regno kaj pli malfrue ankaŭ la mondmerkato fariĝis aĉetmaj konsumantoj. La evoluo de la industrio de la grandkonsumo estis simila. Unue malgranda kampo de interesiĝo, poste debito al la merkato de la tuta mondo. La monhavo kaj riĉeco de la urbo kunhelpis al la progreso. Frankfurto, estante unu el la plej gravaj banklokoj de Germanujo, povis riĉe disponi pri la necesa kapitalo. Ne laste oni devas citi, ke ĉiuj oni povis profiti de la multaj rilatoj al la tuta mondo, kiujn la industrio jam estis gajninta.

La nomo de la urbo estas konata ĉie. Se la citiaj avantaĝoj havas netakseblan valoron, la ĉefkondiĉoj por la prospero de laborloko, kie estas fabrikataj produktaĵoj de pli alta kulturo, tekniko kaj lukso estas la ecoj de la homa spirito de la entreprenistoj kaj laboristoj. Rapida ekonomio, kapableco pri alformigo, organiza talento, komerca porentanta prijuĝo, ekkapto en la ĝusta momento, teknika supereco pri plano kaj ekzekuto, diligenco kaj mana lerteco estas necesaj por krei ion taŭgan kaj sekurigi la debiteblon de la produktado.

La tuta sorto de laboro ofte dependas de eltrovaĵo aŭ patento. Tial ankaŭ la Frankfurta scienco partoprenas al la florigo de la urba industrio. Multaj sciencaj societoj el ĉiuj direktoj kun la industrio ĉion pruvas. Pluan signifon ankaŭ havas la diversaj laboratoroj.

Multon postulas de la laboristaro, oni devas ankaŭ doni al ĝi multon. Proptie oni pagas en Frankfurto la plej altajn labor-elspezojn. La Frankfurta laboristaro rekrutiĝas el unuarangaj fakuloj de la teknika vidpunkto.

La sociaj institucioj de Frankfurto kaj precipe tiuj por bonfarto meritas specialan mencion.

La Foiro de Frankfurt kaj Esperanto.

La malgranda aro de Frankfurta Esperantistoj jam delonge speris, ke sole la praktika uzo de Esperanto akcelos ĝian disvastiĝon. Parta pruvo estas la antaŭ ni kuŝanta Speciala Numero, kaj sukceso, kiun la „Esperanto-Grupo Frankfurto a. M.“ havis en 1908. Tiam okazis la Internacia Aĉetvenda Ekspozicio, al kiu la grupo estis proponinta sian helpon por tulumonda reklamo per Esperanto. Per oficiala lertaro de la ekspozicia komitato, akompanita de klariga lertaro de la grupo, oni petis la kunhelpo de la Esperantistoj per traduko kaj represigo de reklama artikolo en la eksterlanda gazeto. La sukceso estis kontentiga. Alvenis tiam 140 ĵurnaloj en 20 lingvoj.

De kelkaj jaroj la grupo povis nenion fari; dum la milito la tuta laboro ekhaltis. Dume la sistemo estis imita de aliaj samideanoj.

Tuj kiam oni ekorganizis la 1-an Internacian Imporfoiron de Frankfurto, la grupo proponis sin denove por simila reklamado. La komitato akceptis kaj organizis similan propagandon. Kvankam la tempo estis tre mallonga — oni komencis kvar semajnojn antaŭ la malfermo de la foiro —, alvenis 85 ĵurnaloj en 9 lingvoj. La komitato estis kontentiga.

Kiam la 2-a Foiro estis organizita, la grupo denove proponis sin. La foirkomitato samtempe estis decidinta kunuzi Esperanton. Ĝi komisiis stabon de la grupo preni sin la laboron kaj oficiale aligis al si specialan servon: Esperanto-Fako.

Ĝiaj kunlaborantoj estas kompreneble Esperantistoj. Tial respondo al ĉiuj Esperantaj skribaĵoj kaj demandoj estas certigita.

Por vidigi la amplekson de la farita laboro, mi citas la ĉifrojn de la trafiko:

- Oni ekspedis
- 5000 cirkulerojn en 5 eldonoj,
- 50 lerterojn al Esperanto-gazetoj, redaktoroj ktp.,
- 100 lerterojn al izolaj Esperantistoj,
- 250 kartojn kaj
- 200 lerterojn respondojn.

La foir-oficejo Esperanto-Fako ricevis proksimume 450 lerterojn kaj kartojn.

La korespondadon plenumis unu persono. La ekspedadon de la cirkuleroj kaj senombraj propagando-sendaĵoj ekzekutis la kunlaborala stabo kaj la oficistaro de la foir-oficejo.

La sukceso de la reklamo estis bonega. Alvenis 101 gazetoj en 16 lingvoj kun artikoloj pri la 2-a foiro. Kelkaj ĵurnaloj en pluraj lingvoj anonciis ne alvenis, versajne perĝidinte survoje.

La foirkomitato ŝuldas multan dankon al la delegitoj kaj la Centra Oficejo de UEA, al la redakcioj de pluraj

La plej forta industrio de Frankfurto estas tiu, konstruanta maŝinojn kaj aparatojn kaj prilaboranta metalojn. Ĝi ĉirkaŭas preskaŭ la duonon de la okupataj laboristoj. Sole malmultaj urboj, kiel Berlino kaj Hamburgo, superas la urbon je ioma. Krom kelkaj esceptoj kiel Essen kaj Düsseldorf eĉ la kolosaj centroj de la Rejna-Vestfalia industri-teritorio ne povis atingi Frankfurton.

Ankaŭ la metalindustrio evoluigis laŭ la konsumo. La rapide floranta kemia industrio bezonis aparatojn, kiuj ne estis komplika, sed devis esti precize konstruataj por la purgado de la kemiaj produktaĵoj. La multspeca bezono de la urbo kaj de la proksima konsumlando kreigis poste la diversajn branĉojn, kiuj hodiaŭ povas fere konstati abundan kapablecon, t. e.: laborejoj por feraj konstruistoj, maŝinkonstruado, aparatarfabloj por la diversaj industrioj, kiuj reciproke estas aĉetantoj, entreprenoj por konstruado de muĉiloj, akcelilaj por la loĝiĝo de Frankfurto kiel granda grenara komercocentro. Saman- maniere naskiĝis aliaj fabrikbranĉoj. Aliaj metalindustrii ĝis alrangad la transiĝo de Germanujo kiel industri-ŝtato, antaŭe estintaj malgrandaj metiaj laborejoj. Tio cetere estas karakterizaĵo por la Frankfurta industri-uzinoj; la komenco en malgrandaj laborejoj, kiuj per lerta gvidado fariĝis grandaj entreprenoj.

La situacio de Frankfurto estas same favora por la industria grandentrepeno. Dank' al sia transportosituacio Frankfurto kuŝas ankoraŭ je la periferio de la industri-distrikto de Reinlando kaj Vestfalio, en kies centro la maŝin- industrio kaj ĝia helpindustrio ludas duan rolon, ĉar oni devas prilabori pli gravajn maŝinojn. En la tuta regiono de Frankfurto a. M. en la pejzaĝo de la Majno kaj Rejno, oni povis utiligi multajn bonokazonojn. Multaj uzinoj kaj fabrikoj el tiu pejzaĝo akiris famon sur la mondmerkato. Monopoloj de eksterlandaj industrioj, kiuj dum multaj jaroj rezistis, povis esti forigitaj, ekzemple la fabrikado de ŝumasiĝoj kaj iloj por komprimia aero. Por ĉi lastaj trovigis en Frankfurto la plej granda fabriko de la tuta kontinento.

Proksime de Frankfurto, en Hanau kaj Darmstadt, enloĝiĝis la konstruado de vapormaŝinoj. Plue estas en la ĉirkaŭaĵo la industrio por prilabora ilaro, kudrado, agrikulturo, preclreĉaj ilaroj ktp. La smirga industrio eliris de Frankfurto. La eltrovaĵo de la spiritaloĝilo logis en la urbo, kaj en kapablej specialfabrikoj lia eltrovaĵo estis utiligata. En pluraj fabrikoj oni feres maŝinojn por la bezono de la loĝantaro, kiaj ekzemple estas: velocipedoj, aŭtomobiloj, skribmaŝinoj ke. Metal-fabrikoj aperas en la bildo de la industrio kaj liveras lampojn, trezorŝrankojn, kulrejan ilaron, kablojn ktp. Pluan kampon akiris al si la elektro-teknika branĉo, kiu nutrigas nombron de special-fabrikoj. Ni trovas eminentajn liferlandojn, faktorojn pri teknika kulturo de Germanujo. La vera pezmetala industrio

gazetoj, precipe al „Internacia Komerc Revuo“, „Esperanto“, „Esperanto Triumfonta“, „L'Esperanto“, itala gazeto, kaj al multaj izolaj Esperantistoj, al kiuj ĝi respondis speciale.

La tre kontentiga sukceso decidigis la komitaton uzi Esperanton ankaŭ por la 3-a Foiro. La hodiaŭa numero de ET pravas tion.

Intertempe la propagando pligrandiĝis. Oni denove forsendis 6000 cirkulerojn en du eldonoj, 2000 estas en prelo kaj foriris, por Eŭropo, kiam ĉi tiu numero atingos vin. Krom ĝi la foirkomitato eldonis sian prospekton, haveblan en 9 lingvoj, ankaŭ en Esperanto. Tri gravaj Esperanto-gazetoj ricevis grandajn anoncojn.

La laboro de la nova fakvo jam trovis konkurantojn. La komitato de Leipzig, de Helsinko, de Padova kaj de Reichenberg uzas la helpon de la Esperantistoj. Reichenberg eĉ eldonis preskaŭ imitilojn de la Frankfurta pres-ejo.

Por la 3-a Foiro ĝis nun sole eliris 26 gazetoj en 10 lingvoj. La propagando ne jam finiĝis. Oni atendas saman rezultaton kiel la lastan fojon.

Sendube la ekkomencia laboro en Frankfurto estas de alta valoro. Ĝi povas fariĝi grava, por la disvastigado de nia movado en Germanujo. Ĝi sukcesos por la bono de Esperanto, se niaj eksterlandaj samideanoj kunhelpos, rekomante la seriozan karakteron de lia entrepeno.

La Frankfurta Esperantistaro, tial petegas la ĉiulandajn Esperantistojn ekatidi la alvokon kaj fari la necesan. La Esperantistaro ne estas forta. La nombroj pri ĝi, kiujn oni kelkfoje jam citis, estas sole proksimumaj. Tial la propagando ankoraŭ por longa tempo ŝarĝos la ŝultron de malgranda kunlaborantaro. La kunlaboro je la komuna celo per akcelado de la praktika per-ĉiurista laboro en Frankfurto devas esti honora tasko por ĉiu lerta samideano. Nur se ĉiu kunhelpas, la afero sukcesos, kaj la komitato ankoraŭ pli amplekse kunuzos Esperanton.

Mi esperas, ke la eĉo, de tiu ĉi alvoko atingu multajn kolegojn en la tuta mondo.

Libera Vorto de Praktikisto.

Kara leganto, kiu vi nun versajne entuziasmigite legis ĉi tiun special-numeron, ne ŝanĝenmetu ĝin, kiel multaj aliaj samideanoj, en vian ĉiam pligrandiĝantan, neniam satieblan kolekton. Pripensu, kion vi estus faronta, se estus via tasko plenumi servon, aŭ se vi eĉ okupiĝus pri via propra afero. Se vi volas atingi celon, vi devas labori por ĝi. Nia celo kredinde estas serioza; vi mem volas esti tia. Vi sentus vin ofendata, se mi volus diri la kontraron. Aŭdo do:

Nia movado bezonas praktikan helpon. Alimaniere ni atingos la venkon neniam! Ni devas ĉesigi la malnovan sistemon, ĉar Esperanto jam fariĝis grava faktoro en la

de ŝtalo kaj fero mankas komplete, sed tiu de la duon-fabrikadoj en kupro, aluminio, iajuno ktp. estas disvastigita.

Dua grandindustrio de la regiono estas la kemia, unu el la ĉefkoletoj de nia ekonomia vivo. Tie estas vico de grandegaj uzinoj de la anilino-koncerno. Tiu ĉi industrio bezonanta akvon loĝigis laŭlonge de la riveroj. Alia industrio estas la farmacia, reprezentata per multaj firmoj. Parenta branĉo estas la sapifabrikado en la najbara apud-urbo Offenbach. Ankaŭ la gum-industrio havas reprezentantojn.

De antikva deveno estas la ledaja industrio de Offenbach, parte ankaŭ loĝiginta en Frankfurto mem. Monujoj, suoj ktp. guas mondanton. En plia malproksimeco, en Aschaffenburg en Bavarujo, estas la centro de papierfabrikado. Tiu ĉi urbo estas ekonomie ligata al la baseno de la Majno.

La teksfabrikoj ne estas bone konataj, sed la vestaja industrio — vestaĵoj kaj ĉapeloj — estas granda. La Frankfurta virinĉapela mod-ekspozicio estis rapide mondkonata.

En Hanau estas la sidejo de la delikmetala industrio, ne malproksime estas Pforzheim en Baden, kiu konkurencas. La meblo-industrio antaŭe liveris la instalaĵojn por la marŝipoj: La armetio havas antikvan famon.

De la nutraĵa kaj ĝua branĉo ekzistas krom bier- kaj vinifarejoj precipe fabrikoj de konservoj kaj grand-muelejoj. La konstruataj industrioj konigas diversaj entreprenoj speciale konataj per la konstruado de la fervojo de Bagdado.

Estas maleble citi ĉiujn subindustriojn.

La detala priskribo tamen montris la riĉe komercan kaj industran karakteron de Frankfurto.

Frankfurto estas universitata urbo. La malnovaj privilegioj de la antikva metropolo influis ankaŭ la spiritan vivon de la enloĝantoj. Multaj sciencaj institutoj, societoj, lernejoj, akademioj, klerigaj kursoj ktp. ktp. vigligas la neniam trankvilan vivon de la agema Frankfurto.

En ĝiaj muroj okazis dum la lasta foiro la 1-a Internacia Ekonomia Kongreso, prezidita de spiritalo potenculoj el industrio kaj komerc.

Dum la restarigo de bonorda ekonomia vivo en Germanujo Frankfurto estas en la unua vico. Ĝia laborema kaj inteligenta loĝantaro estas kapabla streĉe, celhave kaj fruktodone kunlabori je la progreso, kiu helpas al la rekonstruado de la internaciaj rilatoj.

Kaj neniu alia urbo en Okcidenta Germanujo taŭgos pli bone por plenumi la pacan taskon reunigi la komercantan mondon en konkordo.

mondo. Ni flankenlasu bagatelajojn, pri kiuj okupiĝas tiuj, kiuj ne komprenas la faktan situacion kaj tial malutilas al nia movado. Nia movado estas ankoraŭ malgranda, pli malforta ol vi kredas, multe pli malforta ol fanfaronemaj propagandistoj povos kredigi al vi. Konsekvence, ni devas forligi ĝin. Ni devas propagandi por ĝi, por gajni novajn adeptojn, lernantojn; ni devas fari reklamon por la uzo de Esperanto en la praktika vivo; sed ni devas ankaŭ verbi inter niaj vicoj por maleligi misuzon de Esperanto. Inter la Esperantistoj regas kelkfoje stranga spirito. Oni ĉiam kredas ĉion povi esperantigi sur malligata fundamento. Oni ne konstruas domon sur sablon. Tial nia propagando devas havi bonan grundon. Ĉu vi kredas, ke la publiko el si mem ekinteresiĝos pri nia afero kaj uzos Esperanton, ne vidante avantaĝojn rezultantajn el faktaj? Tute ne; ĝi restos indiferenta, kiel ankaŭ multaj el niaj vicoj; ĝi eĉ malatentos nian aferon, konstante, ke oni donis falsajn, neverajn informojn.

Ni devas streĉe labori, senhalte propagandi por sukcesi iom post iom. Nia laboro estas ankoraŭ pionira. Tial ni kolektu niajn malmultajn fortojn kaj subtenu la seriozan agadon! La hodiaŭa numero de tiu ĉi gazeto ebligas al vi efektiviĝi tion. Estu ideale-praktika homo! Kunligu ambaŭ ecojn kune, ĉar ekstremaj neniam progresas! Kontrabatalu ĉiujn, kiuj ridindigas nian movadon, ankaŭ inter ni mem, ĉar tie okazas tio ankoraŭ tro ofte! Malhelpu ĉiujn malverajn entreprenojn, kiuj kaŭzas malfacilaĵojn kaj de la komenco! Aliflanke estu singardema, ke vi ne erar-komprenu la bonan okazon. Por la fantazioj! La nuda realeco estas alia, kvankam ni ne devas fariĝi egoistaj realistoj. Sed ĉu vi, plenaĝa homo, ludas ankoraŭ per pilko kiel la infanoj?

Legu tion, pripensu kaj komprenu ĝin, agu laŭ la dirita kaj instigu viajn gekonatojn, labori sammaniere. Tiam nia movado baldaŭ evoluigigos pli bone. Tiam la aro de malkontentuloj malgrandiĝos. Tiam ni fine, kaj nur tiam, povos paroli pri antaŭenmarŝo de Esperanto. Tiel longe, kiel ni blinde traŭros la mondon, ni malsukcesos, kaj ĉio, kion ni diras pri la progreso de Esperanto, estas mensogo al ni mem. Oni ne plu neas la ekziston de Esperanto, tamen ne ankoraŭ uzas ĝin generale. Tion lastan ni devas atingi, kaj ni povos tion atingi sole per ampleksa praktiko kaj praktikigo de nia lingvo.

Por tio ni komprenabe bezonas vian entuziasmon, sed saĝan, kies spirito konduku vin por realigi nian celon.

(Fino de l' ĉef-artikolo de la unua paĝo.)



Teknika Parto.



Speciala ekspozicio „La Germana Libro“ montros aron da libroj, instruiloj kaj muziknotoj. La elmontrado dividiĝos laŭ du principoj. Unue oni simple foirmaniere ofertas la produktitaĵojn de la diversaj eldonejoj, due oni elmontras en estetike efikaj ejoj la libron en la sfero, al kiu ĝi fakte apartenas. Oni vidigos tie la bibliotekojn de klerulo, de inĝeniero ktp. aranĝitajn laŭ artistaj projektoj.

Gravan rolon ludos la nove instalata Komercia Borsio. Tiu ĉi donas al eksterlandaj firmoj la okazon ricevi finfabrikaĵojn kontraŭ liverado de krudmaterialo. La borsa direkto zorgos, ke fidinduloj pritraktos la ofertojn por tiu ĉi rekompenca komercado, por ke la krudmaterialo povu esti disdonata al kapablaj Germanaj firmoj.

Estas rimarkinde, ke la aliĝoj al la special-sekcion jam tiom amasiĝis, ke la teksaja branĉo okupas la kolosan spacon de la festhalo. La aŭtuna foiro do ĝuigos la plej grandan ekspozicion de teksaĵoj, kiu ĝis nun okazis.

Tamen ankaŭ la sekcion por ledajoj, ŝuoj, teknikaj artikoloj ktp. evidente pligrandigas.

Oni povas facile ekkoni, ke la foiroj de Frankfurt jam atingis altan gradon de perfekteco.

Estas la intenco de la komitato, daŭre plibonigi la aranĝaĵojn kaj konduki novaĵojn, kiuj iamaniere povos progresi la tutan aferon.

La speciala situacio de Frankfurto faciligos la laborojn de la foirkomitato.

Ĉiukaze la ciitaj detaloj donos elokventan ateston pri la abundaj preparoj faritaj por atingi la plej bonan rezultaton.

Kial Frankfurt, observite de l' nete reala kaj komerca vidpunkto, havas specialajn ŝancojn, mi intencas prui en aparta artikolo.

Celante utiligi Esperanton, bonvolu sciigi la enhavon de la sekvantaj notoj al ĉiuj interesatoj, t. e. komercantoj, unuigoj, -indikatoj, industriistoj, komercistoj, firmoj ktp., citante Esperanton en la ĉiuj maniero.

La informoj interesas ankaŭ la legantaron de taggazetoj kaj fakrevuoj. Bonvolu tial zorgi, ke la notoj, aŭ unu el ili, estu komplete aŭ laŭtenhave represotaj. La informoj estas tiel aranĝitaj, ke ili taŭgas por la enpresigo. La gazetoj faras tion senkoste. La tradukon vi prenos sendube volonte sur vin.

Sendu 3 ekzemplerojn de ĉiu gazeto kun artikolo al la Foir-Oficejo por vidigi, ke la per-Esperanta reklamo sukcesas.

Viaj elspezoj estos rekompenctaj.

Informu per letero aŭ poŝkarto la Foir-Oficejon pri la de vi farita.

Indiku ĉiam vian akuratan adreson por konfirmo aŭ respondo.

Tria Internacia Foiro de Frankfurt a. M. 3-9 Oktobro 1920.

La komitato forsendis la invitojn por la vizito de la jam fama foiro. Ĝi ĉirkaŭas 29 celgrupojn kaj diversajn subiaĵojn. La foir-oficejo uzas Esperanton praktike en sia trafiko kaj forsendis sian katalogon en 9 lingvoj kaj en Esperanto.

Detalojn pri la foiro oni petu tuj de Messamt (Esperanto-Fako) Frankfurt a. M.

Internacia Foiro de Frankfurt a. M.

En Frankfurt okazos 3-a internacia foiro de l' 3-9 de Oktobro.

La vizito estos bona, tuja aliĝo estas rekomendata.

La informojn oni povas havi en*) lingvo kaj en Esperanto.

Oni turnu sin al Messamt (Esperanto-Fako) Frankfurt a. M.

Tria Internacia Foiro de Frankfurt a. M. 3-9 Oktobro 1920.

La Germana grafika branĉo tie havas specialan fakon „La Germana Libro“, rican ekspozicion de libroj el ĉiuj eldonejoj, elmontron de kompletaj fakbibliotekoj bongaste kaj praktike aranĝitaj.

Unuarangaj firmoj partoprenos sub la aŭspicio de la faka socio.

Demandu tuj detalojn haveblajn en 9 lingvoj kaj en Esperanto de Messamt (Esperanto-Fako) Frankfurt a. M.

Arto.

La 3-a internacia foiro de Frankfurt a. M., 3-9 Oktobro 1920, havos specialan sekcion por artobiektoj. Okazos en ĝi speciala aŭkcio por artaĵoj sub la kontrolo de fakuloj kaj fidindaj ekspertoj.

Detaloj pri la foiro estas haveblaj en*) lingvo kaj en Esperanto per Messamt (Esperanto-Fako) Frankfurt a. M.

Teksaja Branĉo.

Dum la 3-a internacia foiro de Frankfurt a. M., 3-9 Oktobro 1920, la teksaja branĉo havos specialan fakon. Ĝi estos la plej granda ĝis nun okazinta teksaja ekspozicio.

Detaloj pri la foiro haveblaj en 9 lingvoj kaj en Esperanto de Messamt (Esperanto-Fako) Frankfurt a. M.

Foiro kaj Tabakindustrio.

Dum la 3-a internacia foiro de Frankfurt a. M. okazonta de l' 3-9 Oktobro oni instalas propran sekcion por la tabaka industrio. Oni vidigos krom la fabrikaĵojn ankaŭ tiurilatajn maŝinojn, ekz. por cigaredoj, porvoivajn premilojn, pak-kartonajojn ktp.

Detalojn oni povas havi en*) lingvo kaj en Esperanto.

Oni sin turnu tuj al Messamt (Esperanto-Fako) Frankfurt a. M.

Novajo en Foiro.

La komitato por la 3-a internacia foiro de Frankfurt a. M., 3-9 Oktobro 1920, instalas neimititan novaĵon: Komercio-Borsion. Ĝi celas kompensan vendadon, ebligante al eksterlandaj firmoj havigi al si finfabrikaĵojn kontraŭ liverado de krudmaterialo. Fidinduloj prenos sur sin ekzameni la ofertojn kaj disdoni ilin al unuarangaj, kapablaj firmoj.

Detalojn oni povas havi en*) lingvo kaj en Esperanto.

Oni sin turnu tuj al Messamt (Esperanto-Fako) Frankfurt a. M.

Foiro kaj Esperanto.

La foir-oficejo de la 3-a internacia foiro de Frankfurt a. M., 3-9 Oktobro, uzas Esperanton por la reklamo. La prospektojn kaj invitojn ĝi dissendis en 9 lingvoj kaj en Esperanto.

Pruvo, ke Esperanto estas pli kaj pli atentata en la komercio.

Detaloj pri la foiro estas riceveblaj de Messamt (Esperanto-Fako) Frankfurt a. M.

*) Pri la lingvoj komparu la anoncon sur paĝo 4.

Ne forgesu: citi Esperanton, se vi konigos la informojn! sendi la petiajn gazetojn al la Foir-Oficejo!

Notindaj Adresoj en Frankfurt a. M.

Messamt (Foir - Oficejo)
Esperanto-Fako
Frankfurt a. M.

Verkehrs-Verein
(Trafika Unuiĝo)
Bahnhofplatz, Frankfurt a. M.

Esperantistaj Grupoj.

Esperanto-Grupo Frankfurt a. M.

Kunvenejo: Moderne Sprachschule, Goethestrasse 10, l. et. — Merkrede je la 7.30 h. vespera.

Laborista Grupo Esperantista.

Kunvenejo: Esperantista Hotelo Anton, Niedenau 12. — Vendrede je la 7.30 h.

Blindula Esperanto-Grupo.

Kunvenejo: Blindenanstalt, Adlerpflychtstrasse. — Ĉiutage: Instruisto M. Urban.

U. E. A.

Loka Delegito:

Hans Fricke,

Niedenau 30 (apud Hotelo Anton).

D. Del. p. Sud-Okcidenta Germ.:

Robert Kreuz,

Schneckenbofstr. 13, III, et.

Redaktis kaj kompilis Rob. Kreuz, gvidanto de la Esperanto-Fako de l' Foir-Oficejo de Frankfurt a. M.

La Haga Semajno.

Granda sukceso! estas la impresoj, kiun oni ricevas aŭskultante la rakontojn de la felikuloj, kiuj povis partopreni nian Dekduan. Granda sukceso ne sole tial, ke la unuan foion post longaj jaroj de malpaco kaj teruraĵoj Esperantistoj el la tuta mondo povis denove renkontiĝi, denove esprimi al si reciproke siajn elkorajn salutojn, denove amike premi la manon unu al alia —, granda sukceso ne sole tial, ke 24 naciecoj estis reprezentataj en la kongreso kaj mirige interkompreniĝis per unu komuna lingvo —, granda sukceso ne sole pro la bona efiko, kiun ĝi faris sur la ne-Esperantistoj publikon —, granda sukceso precipe pro tio, ke fine oni decidis radikalan reorganizon de niaj internaciaj institucioj.

Proponite estas de la direktoro de UEA: pagi unu solan kotizaĵon en unu centran lokon, kiu dividiĝu kaj dispartigu ĝin por la diversaj fakoj; krei Esperantistojn Internacion, kiu povos labori; starigi Komunan Komitaton kun laboro-disdonanta subkomitato kaj kun diversaj branĉoj (komisionoj kun specialaj celoj). Tiunmaniere ni havos laborantajn en kontakto: 1. UEA en Bern, kien estos direktitata ĉiu organiza demando kaj kotizaĵo; 2. CO en Paris kun celo propaganda; 3. LK kaj Akademio, helpataj de Instruata Komitato en London kaj de Literatura Asocio en Dresden.

Akceptiita estas jena propono de S-roj Warden-Stettler:

1. La Kongreso deziras, ke komisiono el individuaj Esperantistoj estu formata por starigi novan kaj pli bonan organizacion;
2. ke tiu ĉi komisiono preparu planon por tio kaj ĝin publikigu;

Ĝi ke tiu ĉi komisiono konsistis el du reprezentantoj de CO, du de UEA kaj tri personoj de la Kongreso.

Laŭ propono de S-ro Nylén estas elektitaj: S-roj Page (Skotlando), D-ro Arnhold (Germanio) kaj Poncet (Francio). Dum la vintro la tuta demando estos pristudata de tiu sepmembra komisiono.

Entute estis enskribitaj 599 gekongresanoj, pliparte Britoj.

Kiel lokon por la 13-a Kongreso oni elektis Praha'n kun la intenco aranĝi postkongreseton en Warszawa por pilgrimi al la tombo de nia Majstro.

Pri ĉiuj detaloj de la kongreso tiel bone sukcesinta, kaj pri la Kongreso de la Katolikaj Esperantistoj speciale, ni raportos en la sekvonta n-ro, kiu estas jam en preparo.

Atentigo.

Pro la speciala eco de la ĉi-estanta numero, ĝi ne enhavas multajn artikolojn, raportojn, anoncojn ktp. senditajn al ni — en la lastaj semajnoj de niaj abonantoj kaj kunlaborantoj. Ni petas ilin pacienciĝi je unu el la sekvontaj n-roj.

N-ro 5, elironte en du semajnoj, estos „Speciala Numero pri la XII-a Universala Kongreso“ kaj enhavos detaliajn raportojn pri la Haga Semajno. Koncizan raporton ni publikigas jam hodiaŭ.

La hodiaŭa duobla n-ro enhavas 8 paĝojn. Al parto de la eldono estas almetitaj specialaj prospektoj pri la Frankfurta Foiro.

REVELANOJ!

Preparu vin jam nun por nia Kongreseto en Düsseldorf, kiu okazos la 19 Septembro!

Por novaj abonantoj.

Malbonan sperton ni faris per nia ĝisnuna sistemo de abonpagado. Ekz. ni ne povas ŝanĝi ĉi tie Anglajn „Postal Orders“, nek Orient-Germanajn, Estonajn, Polajn, Bulgarajn, Portugalajn ktp. banknotojn. Ni do petas pagi estonte nur per ĉi-sube indikitaj banknotoj, per Respond-Kuponoj (15 RK por 10 numeroj) aŭ per ĉekoj sur Germanaj bankoj.

Depost Septembro 1920 ni liveros por 20 G. Mk. 14 n-rojn de ET, por 10 Sil., 10 Svis. Fk., 10 Pesetoj aŭ 5 Hol. Guldenoj 55 n-rojn, por 10 Francaj Fk. 20 n-rojn, por 10 Nordaj Kr. 40 n-rojn, por 10 Italaj Liroj aŭ 1 Dolaro 15 n-rojn, por 10 Finnaj Mk. 10 n-roj.

Al Germanujo, Ĉeĥoslovakio, la Balkanoj aŭ la Baltaj landoj ni liveros 10 n-rojn por 10 G. Mk., 15 n-rojn por 20 C. Kr. — Al Aŭstrio, Hungario kaj Polujo ni liveros 15 n-rojn por 10 G. Mk.

Ĉiu abonanto rajtas enpresigi malgrandajn anoncojn senpage.

Subtenantaj abonantoj pagas duoblan abonsumon kaj rajtas enpresigi grandajn anoncojn senpage (laŭ la disponebla loko).

Ĉiu varbanto de abonantoj ricevos estonte po 10 varbitaj numeroj unu numeron senpage.

Kiu volas komerci kun Hungarlando, devas legi

la Hungaran Komercan Revuon KÖZÉP DUNA

(Meza Danubo), kiu aperas en lingvoj Hungara, Germana kaj Esperanta. Skribu pro abono ktp. al la redakcio:

KÖZÉP DUNA, V, Zoltán utca 10, BUDAPEST.

Ciulandaj komercistoj kaj industriistoj vizitu la

3^{an} Internacian Foiron de Frankfurt a. M.

Importo

3-9 Oktobro 1920

Eksporto

Ampleksa ekspozicio de sekvantaj branĉoj:

- | | | |
|--------------------------------------------------|-----------------------------------------------------|----------------------------------------------------------------|
| 1. Tekstproduktaĵoj. | 11. Artikloj por lumigado. | 20. Kontor-utensiloj, reklamo. |
| 2. Sportbezonaĵaro. | 12. Metalajoj, elektraj artikloj por malalta tensio | 21. Paperoj, kartonaĵoj. |
| 3. Ŝuoj, ledoj kaj aliaĵoj. | 13. Kuiraj kaj mastrumada ilaro. | 22. Pak-materialo. |
| 4. Ledajoj kaj vojaĝartikloj. | 14. Industrio de vitro, porcelano kaj fajenco. | 23. Galanterio. |
| 5. Juveloj, or-, arĝent-kaj ornamaĵoj, horloĝoj. | 15. Medicino, Ĥirurgio, gumajoj. | 24. Ludiloj, instruiloj. |
| 6. Artikloj por fumantoj. | 16. Sapoj, parfumoj, tualet-artikloj. | 25. Meblaro kaj aliaĵoj. |
| 7. Armetio, hina kaj japana imitaĵoj. | 17. Kemia industrio. | 26. Korbaĵoj, kanplektitaj mebloj. |
| 8. Konstruado, higienaj instalaĵoj. | 18. Brosiloj, balailoj, penikoj. | 27. Muzikinstrumentoj kaj notoj. |
| 9. Maŝinkonstruado. | 19. Tabakproduktaĵoj k. subindustrioj. | 28. Maŝinoj, instrumentoj por agrikulturo kaj ĝardeno kulturo. |
| 10. Elektrotekniko. | | 29. Veturiloj de ĉiu speco. |

Prospektoj en la lingvoj germana, franca, angla, itala, hispana, holanda, dana, norvega, sveda kaj en Esperanto.

Korespondado en Esperanto!

Oni petu tuj detalajn informojn de

MESSAMT (Esperanto-Fako) FRANKFURT a. M. (Germanio).

Eksportado

Japana

Importado

Esperanta Komerca Korporacio

Jokohama, Jamasitaco 30

日本エスペラント貿易商會

輸出輸入商

横濱市山下町七十番

Korespondado ekskluzive en Esperanto.

Telegrafa Adreso: Esperanto Jokohama.

Telegrafaj Kodoj: ABC Eldono 5-a, Bentley, Lieber, Western Union kaj Privata.



La Fabrikado de

Fratoj Stork kaj K-io Hengelo (O), Nederlando

konsistas en:

VAPORTURBINOJ, sistemo Zoelly, por ĉiu penco.

VAPORKALDRONOJ, horizontalaj kaj vertikalaj, de ĉiu grandeco kaj diversaj sistemoj, interalie Babcock-Wilcox akvotubo-kaldronoj por normela kaj tre alta vaporigo.

VAPORMAŜINOJ, horizontalaj kaj vertikalaj, kun vapordivido per klapoj aŭ gliifermitoj, ĝis la plej grandaj ampleksoj kaj de diversaj sistemoj, i. a. kontinuufluj vapormaŝinoj de Stork-Stumpf.

TUBO-KONDUKILAROJ por elektraj centroj kaj fabrikejoj.

CENTRIFUGAJ PUMPILOJ por ĉia produkto kaj levanto, por senakvigo de poldroj, akvotubaroj, kaldrononuro, kondensio-aranĝoj ktp.

LEV- kaj TRANSPORTILOJ, i. a. irleviloj por elektraj centroj kaj fabrikejoj, karbotransport-aranĝoj.

DIVERSAJ MAŜINOJ por SUKERFABRIKEJOJ kaj RAFINEJOJ.

RESERVEJOJ de ĉiu amplekso.

MOVIGILARO. FANDAĴO. KRADOSTANGOJ.



Ĉiuspecaj

Cigarbruligiloj Karbidlampoj

— Eksporto. —

Muscat & Christlein Nürnberg (Bavarujo)

Ni serĉas reprezentantojn en ĉiuj landoj.

— Esperanto-korespondata. —



VINJETOJ!

glu-markoj, gumo-stampiloj, sigeliloj, div. gravurlaboroj [plej bona ellaborado] liverataj de S-ano Rudolf Felsenfeld Budapest (Hung.) V. Bályvány-u. 16.

ITALIO!

S-ro Aleksandro Mainardi, reprezentanto-komisiisto, Potenza (Italio) deziras reprezentil en sud-italaj provincoj eksterlandajn firmojn, precipe pri nutraĵoj, likvoroj, dolĉaĵoj, konservajoj, hejmaj komercaĵoj. Unuagradaj referencoj.

Komerc-Agentejo

de Dipl.-Ing. P. Tarnow Kiel (Germ.)

Olshausenstr. 18

prizorgas ĉiajn maŝinojn kaj teknikajn.

Specialaĵoj:

Foder's ŝpar-kuirplataĵoj

por ĉiu elektra tensio (110 kaj 220 Voltoj tuj liverebaj).

Laviabulaĵo kun zink-lamena enmetaĵo. Tre moderaĵo. — Pogrande speciala rabato.

Pollanda Komerca Agentejo

Eksporto • Importo

Ad. Oberrotman, Varsóvio

Krak.-Przedm. 10

sin rekomendas por reprezentil diversajn artiklojn por Polio, Galicio, Litovio ktp., donas ĉiajn informojn pri la Polaj komerclokoj.

Pitman's Commercial Esperanto

A handbook of the International Language for World-Traders

by W. M. Page

eldonita sub la aŭspicioj de


— La Asocio por Komuna Komerc Lingvo. —

Prezo 2 ŝ. 6 d.

London: Sir Isaac Pitman & Sons, Ltd.

1, Amen Corner, E. C. 4.

Bath, Melbourne and New York.



La Hungara Agrikultura Muzeo en Budapeŝt.

En la antaŭa numero ni komencis la publikigon de serio da kliŝoj el la belega Hungara ĉefurbo, afable pruntedonitaj al ni de la *Fremdul-Oficejo en Budapeŝt* (Köpenförgalmi, IV, Harisköz 1). Hodiaŭ ni daŭrigas la publikigon per la bildo de la vidinda Agrikultura Muzeo. Pluaj vidajoj sekvos en la venontaj numeroj.

La relativeca teorio de Einstein.

La scienco laboras per aliaj metodoj ol la praktika vivo. Ni mezuras laŭ turoj kaj kilogramoj. La plej malgranda pes-unuo estas la gramo. Ni konsideras jam kiel kapablon povi konstati duonan gramon. Nia mezurilo pri la longeco estas la kilometro. La plej malgranda unuo estas la milimetro. En la sciencia laboro eĉ la miligramo (do milona gramo) ne estas jam la plej malgranda mezurilo. La milimetro estas ankoraŭ dividata ĝis milion-onoj.

Nefakulo, kiu hazarde ĉeestas al tiaj laboroj pri laŭŝajne ne ekzistantaj aĵoj sin demandas: Kian celon tio havas? Tio ja estas tute malproksima de la praktika, aga vivo, tio tute ne havas valoron por la laboro ĉiutage postulata de mi.

Tio estas ĝusta aŭ, pli precize dirata, ŝajnas esti ĝusta. En la realeco kelka ago estus plene malebla, se sciencia laboro ne estus antaŭirinta. Mi citas sole la plej konatan: oni povus ekzemple nek telegrafi nek telefoni, se ne sennombraj, plej precizaj provoj, mezuradoj kaj kalkuladoj estus ebligitaj la vojon. Ni ne havus la senfadenan telegrafion. Ni malhavas multon. Ni ne sciis klarigi al ni multon je la ĉielo aŭ sur la tero, se

ne esploristoj de astronomio kaj de astrofiziko okupiĝus per penigaj, komplikaj esploroj, al kiuj nefakuloj restas indiferentaj.

La rezultato de tia esplorado aŭ, pli vere, tre intensa medito okupiĝas nun la civilizitan mondon. Ĝi estas produkto de matematika. Laŭ la maniero, per kiu ĝi prezentigas al nefakulo, ĝi ŝajnas unue ne sole malkomprenibla, sed eĉ tiom flanke de la praktika ĉiutaga vivo, ke oni povus juĝi sencelaj la laboron kaj la rezultatojn. Komprenibla la sciencia mondo pensas alie pri ĝi. Ĝi karakterizas la novan ideon kiel unu el la plej grandaj sciencaj faroj de tiom eminenta signifo por la estonto, ke oni estas konvinkata, ke post jarcento la opinioj pri multaj natursciencaj kaj astronomaj fenomenoj estos tute aliaj kiel la nunaj. La nova ideo, la nova teorio estas la *principo de la relativeco*.

La elpensinto estas la Germana matematikisto Prof. *Alberto Einstein*.

Resume oni povus karakterizi la sencelon de tiu ĉi principo laŭtente: La opinioj, kiujn ni ĝis nun havis pri la naturreĝoj, ne estas malĝustaj, sed ilia valoro nur estas preskaŭa kaj bezonas pliperfektiĝon, plibonigon, kelkafoje eĉ ŝanĝigon pro speciala kaŭzo. Oni maltenis unu faktoron eĉ ĉiuj mezuradoj kaj kalkuladoj por sciencaj

celoj. Oni mezuris altecon, longecon, larĝecon — la konatajn tri dimensiojn; sed oni forgesis la tempon. Kiel oni mezuras la spacon, oni devas ankaŭ mezuri la tempon, ĉar spaco kaj tempo apartenas unu al la alia kiel unuo. Tio ŝajnas stranga kaj malkomprenibla. Ni kredas, ke la spaco kaj la tempo estas apartaj aĵoj kaj havas tute nenion komunan. La matematikisto kontraŭe asertas: Oni povas imagi la pasadon de la tempo nur en la spaco, kaj oni povas imagi okazadon en spaco nur kune kun la pasado de la tempo. Ambaŭ estas maldisigeble ligataj. Ĉiu mezurado postulas ne sole spacon kaj tempon, sed la tutaj: spaco-tempo. Nia ĝisnuna pensado kontraŭstaras al tio. Nur tiu, kiu scipovas la pli altan matematikon, kapablas pruvi la tezon pri spaco-tempo.

El la principo de la spaco-tempo rezultas duktoj same strangaj al la nefakulo kiel la principo mem.

Unue tio, kion ni nomas samtempeco, fundamente ŝanceliĝas, — ne la samtempeco sur la malgranda spaco de la tero, sed tiu en la universo.

Ni faru imagon de tiu ĉi frazo per fantazia ekzemplo. Ni supozu, ke super la tero iradas pluraj mondkorpoj, ekzemple kometoj, en diversaj rapidecoj. Ni imagu plue la maleblan okazon, ke la loĝantoj de la tero estus sukcesintaj interkompreniĝi kun la loĝantoj de la preterpasantaj kometoj kaj ke ĉiuj horloĝoj estus reguligitaj je la egalaj minuto kaj sekundo. Subite lumero trairus la universon. La lumo havas rapidecon de 300 mil kilometroj en la sekundo. Se en la momento, kiam tiu ĉi lumradio ekfulmas, la loĝantoj de la diversaj kometoj rigardus je iliaj horloĝoj okazus strangajo. Ĉiuj horloĝoj ja akordigis. La lumfulmo estus vidata sur la tero precize je la 12a horo. Ĉu ĝi estus vidata precize je la 12a horo ankaŭ sur la kometoj? Ne, ĉar ĝi estas vidata sur ĉiu kometo laŭ la rapideco de ĝia moviĝado post la 12a horo aŭ pli frue, ĉiokaze ne en la sama momento en kiu ĝi estas konstatata per horloĝo sur la tero. Ĉiu el tiuj ĉielkorpoj do havas sian propran tempon, ĉar en la universo ne ekzistas samtempeco. Ĉiu tempo-mezurado estas relativa, dependa de la karaktero de la koncerna ĉielkorpo.

La elpensinto de la relativeca teorio, Prof. Einstein, mem donas la sekvantajn ekzemplojn: Inter du stacioj, eble A kaj B, veturas vagonaro en granda rapideco. En ambaŭ lokoj troviĝas horloĝoj. Ambaŭ horloĝoj estas egaligitaj ĝis onoj de sekundoj. En A kaj B okazas lumfulmo je la sama tempo. Observanto sidanta sur la fervojo-digo de la linio de A al B tiam ekkonstatas la du lumfulmojn en la sama momento. Tamen alia, sidanta en vagono meze de la veturanta vagonaro, vidus ĝin alie. La vagonaro kvazaŭ rifugaĵas de la el A venanta lumfulmo kaj alrapidas al tiu de B. Konsekvence la observanto sur la vagonaro ne konstata la lumfulmojn samtempe kiel la observanto sur la fervojo-digo. Do ne ekzistas absoluta samtempeco. Ĉiu korpo havas en ĝia moviĝado rilate al la moviĝado de la alia korpo, do proporcie, sian propran (relativan) tempon.

Ŝipeto jam iras for, kaj Katerina tie ploreĝas tiel laŭte, ke ŝia voĉo superas ĉiujn Germanajn voĉojn. La Loziŝĉanoj montras al la Germano monon, sian tutan monon, por ke li ne pensu, ke ili triope intencas veturi laŭ unu sola virina bileto. Dima kaŝe enŝovis malgrandan moneron en la manon de la Germano, ĉiam montrante al li la vaporŝipeton kaj la virinon, kiu jam preskaŭ perdis la voĉon pro timeksciĝo kaj ploroj...

Nenia sukceso! La Germano ne forforiĝis la moneron, eĉ diris al la Loziŝĉanoj ion afablan, sed kiam ili evidentigis la intencon transsalti la barieron por ankaŭ trafi la vaporŝipeton, la Germano okulsignis al la du ŝipanoj, kaj post momento Dima kaj Mateo ambaŭ jam estis malproksime de la bordo, kaj Dima teren falis, svingante la piedojn en la aero.

Kiam li levigis, la vaporŝipeto farinte turnon jam estis preterglitanta laŭlonge de la bordo. Ekmovigis la ŝipradoj, sendante al la albordigejo ŝprucostriojn de malklara akvo, la vosto de fumo tuŝis la vizaĝojn de la dense amasiĝintaj homoj eĉ la bordo, poste vidigis la ploruga terurita vizaĝo de S-ino Lozinska, kaj post momento inter la albordigejo kaj la ŝipeto jam kuŝis bruetanta peco da malpura akvo du-tri klaftojn larĝa. La radoj eklaboris pli vikle, la akva distanco fariĝis baldaŭ dek, dudek klaftojn granda, kaj la ŝipeto ĉiam pli kaj pli malgrandiĝis, forkurante en nebula aero, sub nebula ĉielo, sur malklar-akva rivero.

La Loziŝĉanoj kun malfermitaj buŝoj rigardis, kiel la vaporŝipeto albordigis al granda ŝipo, kiel etendiĝis inter ili lo simila al maldika stangeto, sur kiu kvazaŭ formiko ekrapis supren homoj kun pakajo. Poste la ŝipego elspiris nigran fumon, sonore kaj profunde fajfegis, kiel grandega virbovo en la bovinaro, kaj malrapide eknavigis inter aliaj pli malgrandaj ŝipoj.

(Daŭrigota)

La Senlingvulo.

Rakonto de Vladimir Korolenko.

Tradukis laŭ la 5-a Rusa eldono kun permeso de la aŭtoro Maria Ŝidlovskaja.

Rekomendita de Esperantista Literatura Asocio.

(2-a daŭrigo.)

Sed Mateo respondis:

„Estu, kiel Dio volas! Sed mi ne forlasos la fratinojn kaj Ivanon.“

Tiel ili ekvojaĝis triope al la malproksima lando. Ne estas priskribinda ilia vojaĝo ĝis la landlimo kaj poste tra la Germana lando, — tie ili havis neniujn malfacilaĵojn: en Prusujo ili renkontis ne malmulte da siaj samlandanoj, kiuj instruis al ili, kion kaj kiel ili devis fari. Suffiĉas, se mi diros, ke, alveninte Hamburgo, ili kun pakajo en la mano sen plia meditado ekiris al rivero, al la albordigejo, por tie informiĝi, kiam forveturas ilia ŝipo.

Hamburgo, Germana urbeĝo, staras eĉ granda rivero, ne tre malproksime de la maro, kaj de tie ŝipoj veturas al ĉiuj flankoj. Jen niaj Loziŝĉanoj vidas eĉ la bordo grandegan amason da homoj, alkurantaj de ĉiuj flankoj, rapidantaj kaj interpuŝiĝantaj tiel, kvazaŭ homo estus trabo, kuŝanta sur ŝoseo. Du malgrandaj vaporŝipoj seninterrompe alveturigas pasaĝerojn de la bordo al ŝipegoj, ĉar la ŝipegoj, kiuj veturas sur oceano, staras je iom granda distanco, sur la ŝipe profunda loko. Vidas la Loziŝĉanoj, ke unu ŝipego eligas fumon, kaj vaporŝipetoj multfoje ĝin aliras, eljetas sur ĝin homojn, kestegojn, valizojn, paketojn kaj poste ree rapide kuras al la albordigejo kaj, denove ŝargitaj, revenas kaj revenas.

Dima, bone esplorinte ĉion, tuj divenis: „Ĉu vi scias“, li diris, „ŝajnas al mi, ke tio estas la ŝipego forveturanta Amerikon, ĉar tre granda ĝi estas. Jen kiel ĝuste ni trafis! Nu, Mateo, ni penu trapuŝiĝi!“

Ili antaŭen metis la virinon kun ŝia bileto en la mano kaj komencis trabori al si la vojon, interpuŝante la homamasojn. Tiamaniere ili atingis la albordigejon, sed tie videble oni akceptis jam la lastan grupon. Mia Dio! kio fariĝis eĉ la bordo: oni ploras, oni krias, oni ridas, oni ĉirkaŭbrakas unu alian, oni insultas, oni svingas poŝtutojn! Okuloj sur ĉiuj vizaĝoj, larmoj de adiaŭo en ĉiuj okuloj... Ĉie sonas fremda lingvo, la orelojn tuŝetas fremdaj paroloj, nekompreneblaj kaj sovaĝaj, kiel ondoj, ŝaŭmantaj eĉ la piedoj. La kapoj de niaj Loziŝĉanoj turniĝas, la koroj batas; la okuloj streĉe rigardas antaŭen, por ne postrestri en la malnova Eŭropo, kie ili naskiĝis kaj pasigis duonon de sia vivo...

Mateo Lozinski ne havis multe da malfacilaĵoj, traborante al ili ĉiuj la vojon, kaj du minutojn poste Katerina jam staris kun sia kofro eĉ la ponteto, tenante en la mano la bileton. La vaporŝipeto jam estis dufoje fajfinta plende kaj altone, nigra fumo jam eligis el ĝia tubego en la malsekan aeron, — videble, ĝi estis jam fornavigonta, jen sonis la tria ekfajfo, kaj io ekbruligis sub la piedoj tiel forte, ke la Loziŝĉanoj eĉ tremetis kaj kontraŭvole returnen paŝis. Je la sama tempo altkreska Germano kun elorbitigitaj okuloj, kiu la plej multe klopodis kaj ŝvitis eĉ la vaporŝipeto, — vidante Katerinan, eliris la bileton el ŝiaj manoj, revizis ĝin, redonis ĝin al ŝi, kaj antaŭ ol la Loziŝĉanoj povis ion kompreni, la virino kun sia malbeza pakajo jam troviĝis en la vaporŝipeto. Samtempe du ŝipanoj returnen ŝovis la moveblan ponteton, faligis Diman teren, forpuŝis Mateon kaj eliris la ponteton sur la bordon. Niaj Loziŝĉanoj sin jetis al la altkreska Germano.

„Timu do Dion, homo!“ kriis al li Dima, „ŝi estas nia fratino, ni volas kune forveturi!“
Dima iomete mensogis, nomante Katerinan sia fratino, sed kion utilas la mensogo mem, se la Germano eĉ unu vorton ne komprenas! La vapor-

La spacmezurado estas ankaŭ relativa. La formoj de la korpoj generale de ĉiuj objektoj de la kometoj, kiuj moviĝadas super la terglobo, aspektas alimaniere sur la tero ol sur la kometo. Bastono, havante ekzemple unu metron laŭ la mezurilo de l' kometo, estus pli mallonga laŭ la tera mezurilo. Ripozanta korpo, fite estante kuglo, estus surtere laŭ mia impresio rotacia elipsoido. Se la kometo moviĝus en la rapideco de la luno, ĝi ŝajnus al ni kiel senfine maldika cirkelforma disko. Se iu demandus, kian realan formon havas tiu ĉi korpo, ni devus respondi al li konforme al la relativa teorio: eĉ la senco de la realeco perdas la absolutan signifon.

Ĝis nun mi nur paŝis de problemo al problemo. La afero fariĝas ankoraŭ pli komplika, konsiderante la pluajn konsekvencojn de la relativa teorio. Tio koncernas unue la doktrinon, ke la universo devus havi propecan strukturon. Ĝis nun valoris la pretendo, ke la cirkulado de korpoj, alproksimiĝantaj unu al la alia, estus rapidigata. La tezo de la relativa teorio tamen vidigas, ke estas alie. Kiel la tero laŭ ĝia strukturo ne estante plata kuglo havas montojn kaj valojn, multajn malebenaĵojn, ankaŭ la universo havas tiajn malebenaĵojn. La ĉielkorpoj alformiĝas al ili kaj konsekvence moviĝas laŭ malekta linio. Sole per tiu kalkulita tezo klariĝas interalie fenomeno, kiun la astronomoj ĝis nun ne povis klarigi al si. Tio estas la moviĝo de la perihelio (proksimeco al la suno) de l' planedo Merkurio je 43 elipso-sekundoj dum 100 jaroj. El la kalkulado de tiuj malektaĵoj klariĝis la enigma malproksimiĝo.

La malektaĵoj (kurbo) en la universo estas diversaj. Ili kaŭzas diversajn konsekvencojn laŭ la diverseco. De la speco de l' kurbo dependas ne sole la lumrapideco, sed ankaŭ la irado de la horloĝoj sur la diversaj planedoj en la koncerna elipso, la pasado de la tempo kaj aliaj fizikaj fenomenoj.

Einstein formis per sia relativa teorio la tezon, ke lumradio preterpasanta je la rando de l' suno devus esti erardirekata el sia laŭplana vojo je 1,7 elipsa sekundo. Tiu ĉi profetigo fakte certigis dum la sunokulpo en Brazilio en Majo de 1919. Laŭ la opinio de la scienca mondo ĝi estis unu el la plej bonaj pruvoj por la ĝusteco de la principo pri la relativeco.

La nova teorio ne ŝajnas havi rilaton al la praktika vivo. La scienculoj pensas alie. Ili ĝin konsideras tiom grava, ke ĝi kaŭzas kompletan ŝanĝon de la opinioj kaj labormetodoj en multaj aferoj de la naturscienco kaj fiziko. Ne laste la astronomio estos grave influata. De multaj flankoj oni komparas la eltrovon de la relativa teorio kun la eltrovo de Kopernikus. Li kreis tute novan opinion pri nia sunsistemo. Li fiksis la teorion, ke la tero simile al aliaj planedoj moviĝas ĉirkaŭ la suno, kaj ke ne okazas alimaniere, nome, ke la suno ĉirkaŭtradas la teron. Kopernikus nuligis multajn opiniojn kaj labormetodojn de jarmiloj. Same faros la principo pri la relativeco. Por enradikiĝi la doktrinon de Kopernikus, pasadis preskaŭ du jarcentoj, antaŭ ol ĝi konkeris la senkonfidecan konsideron de ĉiuj pensuloj. Same la relativa teorio bezonas tian tempon por fariĝi spirita posedaĵo de ĉiuj. Kion ni nun tute ne komprenas, iun tagon fariĝos tute memkomprenebla por ĉiuj kleruloj.

Tiel pensas nun astronomoj, matematikistoj kaj fizikistoj. La praktika vivo restas ankoraŭ in-

diferenta al tio — kaj ĝi alportas al ni tiel multajn aliajn kaj pli grandajn zorgojn!

(Laŭ „Allg. Wegweiser.“)

R. Kr.

(La traduko de ĉi-supra, interesege por sciencistoj kaj laikoj, artikolo en naciajn lingvojn kaj ĝia publikigo en naciaj gazetoj estas permesata kaj eĉ dezirata; sed oni ne forgesu aldoni, ke la traduko estas farita laŭ „Esperanto Triumfonta“, kaj sendu de ĉiuj koncerna gazetonumero po 2 ekzempl. al la eldonanto de ET.)

NOVA KOMPREENO DE LA VIVO KAJ ĜIA PRAKTIKA SIGNIFO POR LA HIGIENO. (1-a daŭrigo.)

En ET n-ro 1 troviĝas en tiu ĉi artikolo, 3-a alineo, 2-a linio, pres-eraro. Oni bv. legi: Tiu ĉi problemo pri la sekreto de la vivo distalas en du subproblemojn: 1-e pri la senco [ne scienco] de la vivo, kaj 2-e pri la eksto de la vivo, kaj la fortoj funkciantaj en ĉiu vivanta korpo.

En la jaro 1889 la fama fizikisto Heinrich Hertz, bedaurinde tro frue mortinta, ĉe la natur-espiorista kunveno en Heidelberg (Germanujo), prezentis unue la tezon ĝis nun ne rebafitan, ke la okulo estas organo elektra. La vidorgano estas ne sole la okulo, sed atingas la projekciejojn de la granda cerbo. Ni vidas ne per la retino, sed per la cerbo, speciale per la okcipita lobo. Ni vidas poste, dank' al la elektra konduko, per la okulnervo (la dua cerba nervo). La refino ŝanĝas la eterajn lumondojn en cerban elektron.

Fine, se oni rigardas la konstruon de nerva ĉelo kun ĝiaj diversaj branĉetoj, malŝositan al ni unue de la Hispana anatomiisto Ramon y Cajal, la interpreto devas sin trudi, ke la nervaj ĉeloj mem estas elektraj elementoj kaj akumulatoj, kaj la nervoj la kondukantaj fadenoj.

Certe estas bone doni tie ĉi unue mallongan historion de la tuta problemo, precipe de la provoj, science klarigi la nervlaboron kaj la naturon de la fiziologia funkcio.

Inter ĉiuj provoj historiaj unu el la plej antikvaj havas la plej profundan sencan: la ideo de Newton pri la nerva fluidaĵo, kiel nepesebla etero, povas hodiaŭ valori kiel antaŭseno de la pli moderna teorio elektrona. Sed la tezo, ke la nerva agemo en homa kaj besta korpo estas bazata sur fenomenoj elektraj, estis eldirata nur en 1745 de Hausen kaj en 1744 de Sauvages; tamen oni rezignis pri ĝi pro la malsamo inter la normalaj kaj la eksperimentaj kondiĉoj.

Eltrovinte la bestan elektron kaj la baton de la elektraj fiŝoj, Galvani estis delogata rekoni en ĝia fluo la vivspiritojn mem. Ĉiuj tiaj imagoj povis nur erarigi, ne atentante la principan diferencan inter la normala organa funkciado kaj fizika eksperimento. Krome pruvo de aŭtotonaj elektraj fluoj en la nervo mankis. (Komparu la resumon en la fama lernolibro de Joh. Müller „Fiziologio“ 1837, l. 64 k. sekv.) Tiu ĉi pruvo nur en 1845 estis liverata de Emile du Bois-Reymond per la eltrovo de la elektrotonuso kaj de la negativa ŝanceliĝo de la nervofluo.

Jam en la sekvinta jaro naturfilozofo R. Chambers en sia libro „Vestigis“ (postsignoj) starigis la tiam riskatan, hodiaŭ preskaŭ memkompreneblan hipotezon, ke la vivo estas naskata per „hemio-elektra procedo“.

„Mia grandemeco ofte bezonas instigon; ne tiom, se mi devus venki barojn, ol se mi povus eluzi bonŝancon.“

„Mi ne vidas ŝancon.“

„Estas eble, Marie. Vi inoĵ ja malofte vidas —, vi sentas.“

„Mi bedaŭras...“

„Mi ankaŭ. Sed ĉi nesentado ofte ne estas speco de nova, anima netuŝiteco?“

„Kiel vi tion opinias?“

„Ni viroj komparas la travivaĵon kun la okazintaĵo. Vi virinoj konas nur la momentan mezurilon de l' sentado. Pro tio via forto neniam estas laimigata per la estinto. Ĉiam vi amas rez — la unuan amon!“

„Per aliaj vortoj: Vi viroj ŝatas la fidelecon kiel rezignon, kiu tiam al vi ŝajnas esti pli facila. Ni virinoj opinias la fidelecon posedoĵo, kiu forigas deziron al fremda propraĵo. Sed — kion signifas ĉio ĉi tio? Ĉu mi ŝuldas al vi — fidelecon?“

„Ne — tio estis iam!“

„Do —! Se mi nur restas fidela al mi mem!“

„Tia fideleco ne pentigas.“

„Ne!“

Li elpovisigis domŝlosilon kaj haitis: „Jen la alia ŝlosilo!“

Si suprenrigardis mire al la domo.

„Ni ja estas ĉe la loĝejo de Albert!“

Li malŝlosis la dormpordon.

„Vi do volas eniri...“

„Jes, Mariel! Sed, mi petas, — post vi!“ BABEOR.

HUMORO.

MODERNAJ INFANOJ.

— Se vi ne baldai ĉesigos tiun bruon, tiam okazos io!

— Ĉu ne, paĉjo, tiam vi iros tute simple en alian ĉambrojn?

JUĜO PRI PESTALOZZI.

En la strato de la stacidomo en Zürich du knaboj de la vilaĝo rigardas la monumenton de Pestalozzi. La plej juna demandas la pli aĝan:

— Kiu estas liu homo?

— He, tiu estas Pestalozzi, kiu eltrovis la malbenitan lernejon!

ŜANĜO EN LA LUDO.

La malgrandaj knabinoj ludas kun pupoj, la knaboj kun soldatoj. Kiam la infanoj fariĝas pli aĝaj, tiam la knabinoj ludas kun soldatoj kaj la knaboj kun pupoj.

(Marg. Iv. Kr-off.)

Kiam duBois-Reymond en la jaro 1848 instruis la „identon“ inter la laŭnormala besta elekto kaj la eksperimenta, oni kredis la vitalismo definitive subigata. La ideo de duBois-Reymond malsukcesis longtempe, ĉar la kurrapido de la fluo elektra tra homa nervo estas tute malsama ol tra telegrafa fadeno. Kurante 40000 mejlojn po sekundo en metalaj kondukiloj, la elektra fluo en la homa nervo nur faras 40—60 metrojn dum la sama tempo. Sed oni ne pripensis, ke la homa nerva sistemo ne estas fadena sistemo, sed konsistas el malseketaĵoj kolodaj konduktoroj. En tiuj ĉi konduktoroj la elektraj fluoj estas ĥemie variigataj, diferencigataj kaj malrapidigataj.

Grava estas por ĉiuj fluidaĵoj ne nur la rapido, ebla sub certaj kondiĉoj, sed ankaŭ la kontraŭstaroj. En la nervoj homa kaj besta ili estas tiel grandaj, ke eĉ la elekto ne atingas pli grandan rapidon ol 60 metrojn po sekundo. Kaj tio por la organa vivo estas senkondiĉa neceso, ĉar per la rapideco de la elektra fluo en la metalfadenoj aŭ en la aero, la homa korpo simple ne povus labori.

Do, ke fortoj elektraj ekzistas en la korpo, oni generale akceptas science. Sed oni ĝis nun ne povis identigi nervan forton kaj elektron. Jen medicina laiko, la antaŭnelonge mortinta D-ro Georg Hirth, unue riskis la tezon, ke en nia homa korpo temas pri elektro-hemia funkciado. Estas por mi aparta gojo, starigi monumenton al tiu ĉi homo eminenta kaj multvalora, kaj estas peninde, ekkonii kelkajn datojn el lia biografio.

En la angioj de tiu ĉi homo temperamplena fluis sangomiksaj klarigataj samtempe la forton kaj viglon de lia karaktero. La patro ĝermis el vilaĝa familio Turinga sed eniris la akademian mondon, fariĝis advokato kaj notario kaj edziĝis filinon de Pariza scienculo. La plej aĝa filo estis nia Georg Hirth, naskiĝinta la 13-an de Julio 1841 en Gräfenonna en Turingio. De la patro li heredis la emon al scienca cerbumo, de la patrino la vinsangon kaj la konsolan rezignon je la neatingebla.

Ne ankoraŭ plenaĝa Hirth venis, kiel lernanto, en la geografiejon de Justus Perthes en Gotha, studis tiam en Leipzig kaj fariĝis ano en la Nacia Unuigo (Nationalverein), fondita de Rudolf von Bennigsen kaj celanta la unuecan formadon de Germanujo sub Prusa estro. Li komencis kiel nacia politikulo kaj naciekonomiisto, tiam li fariĝis redaktoro de la „Germana Gimnastia Gazeto“ (Deutsche Turnzeitung), plendis forte kaj insistis por unuigota Germanlando. Frutempe jam li ŝatis laboron pozitivan. Praktiko, orgenata talento kaj eksterordinara laboremo lin distingis de komenco.

En 1866 li estis la unua vundito. Li ricevis pafon en la femuron dum la batalo ĉe Langensalza la 27-an de Junio. Laŭ lia propra rakonto, la kruro nur per tio estis konservata, ke li ne tuj falis en la manojn de la hirurgoj sed estis flegata unue en privata domo, kaj kiam fine venis hirurga helpo, la afero jam tiom sanigis, ke oni rezignis operacion. Tiamaniere li havis okazon konigi kaj la ortodoksa medicina sistemo de flanko interesa.

Tiam li fariĝis ano de la Berlina statistika seminario direktata de la fama statistikisto D-ro Engel, en kies domo mi ofte ankaŭ kiel knabo gastiĝis, ĉar la pli juna filo de Engel estis mia lerne-amiko.

DU INFANOJ.

El „Poemetoj en Prozo“

de Franca poeto CH. BEAUDELAIRE.

Mi volas doni al vi l'ideon de distrado senpeka. Estas ja tiel malmulte da senpekaj amuzoj!

Kiam vi eliradas iumaten, kun intenco sencela promeni sur grandaj vojoj, plenuĝa viajn poŝojn per malgranda, malmultekostaĵo ludiloj: plata pulcino movigata per fadeno, — forĝistoj, kiuj frapas amboson, — kavaliro sur ĉevalo, kies vosto estas fiŝilo. Irante preter drinkejo, sub arbo, donacu tiujn ĉi aĵetojn al infanoj, kiujn vi renkontas, nekonsataj kaj malriĉaj.

Vi vidos, kiel larĝe mallempigis iliaj okuloj. Komence, ili ne kuraĝas akcepti donacon: ili ne fidas al sia felico. Poste, iliaj manoj rapide ekkapotas la ludilon, kaj ili forkuros, simile je katoj, kiuj manĝas malproksime de vi pecon al ili donitan, ĉar ili kutimis malfidi homojn.

— Sur vojo, malantaŭ la krado de vasta parko, en kiu vidiĝas blanka palaco lumigita de suno, staris bela, freŝa infano en kampara vestaĵo, elegant-aspekta, koketa.

Tiu ĉi infano estis tiel plibeligita de senzorgeco, de lukso, de kultra riĉa cirkulo, ke ili ŝajnas esti alia mondo ol infanoj de malriĉuloj al mizeruloj.

Apud li, en herbo, kuŝis helbrilega ludilo, freŝa kiel sia posedanto, lakita, orumita, vestita en purpura, kovrita de plumufetoj, de vitroj. Sed l'infano eĉ ne rigardis sian belan ludilon, sed ian alian.

Aliaflanke de la krado, sur la vojo, en urtikaĵo kaj kardajo, staris alia infano, malpur, malfortik-aspekta, fulga — unu el tiuj bubaĉoj-pariaĵoj, kies belco malkaŝus sin el okuloj — simile je ideala pentraĵo sub laksmiraĵo —, se iu volus ĝin purigi de naŭza oksidaĵo de la mizero.

Tra tiu ĉi stangoj simbollaj, kiuj disigis du mondajn — grandan vojon kaj palacon — malriĉa infano montris al infano riĉa sian ludilon, rigardante de la dua kun kuriozeco, kvazaŭ aĵon neniam viditan, nekoniitan.

Do tiu ĉi ludilo, en kiesto kradogamita, ludilo ted-inecanta, maltrankviligita, skuita de malgranda malpurulo, estis — vivanta ratoj! Malriĉuloj pro ŝparemo donis al sia infano malmultekostan ludilon.

Du infanoj ridetis unu al alia frate, montrante deitojn egale neĝblankajn.

El Franca lingvo tradukis
ALEXANDRA MEXIN, Ĝenevo.

RIPOZO.

Jam estingita estas la suno,
ĉe l'horizonto staras nubbar.
Hele ridetas la steloj kaj luno,
regas silent sur tero kaj mar.
Kiam la tag nun estas finita,
tiam mi, kiel kampa flor,
dolĉe en dorm kun kapo klinita
songos pri l' juna, luma hor.

(El „Esperanta Ligilo“.)

J. WULFF,

blinda Dana samideano.

FIDELECO.

Ili disigis sin el la amaso de l' koncert-vizitintoj, elpremiĝanta el la koncertejo, momente haltis kaj sin turnis samtempe al unu direkto.

„Sed — la stacidomo...“

„Mia vagonaro veturos nur post unu horo. Cetere, via vojo ankaŭ ne kondukas vin ĉi tiun direkton!“

„Dum la kelkaj tagoj de mia restado mi interŝanĝis la hotelon je la loĝejo de Albert.“

„... de Albert —“

„Jes — li donis al mi la ŝlosilon: Amikeco devigas; mia helmo estu la via.“ Kaj tiam sentemante li daŭrigis: „Mia foresto soleciĝis ĝin; mi do fidas al vi ĉion.“

Si skuetsis la kapon. Li ridetis.

„Eble vi trovas tion stranga, Marie. Li fidis al mi eble, ĉar li sciis ke mi al li pardonis lian ĥaman peridon.“

„Silentu!“

„Pro kio? Ĉar vi nun pentas pri tio? Sed nun vi estas ja lia fianĉino!“

„Kial vi tion akcentas?“

„Vi estas prava, Marie. Mi volas forgesi same kiel mi pardonis. Ne fadiĝus tute ĥaman proprajon, kiam oni fariĝis administranto de l' nova posedanto.“

„Certe vi esceptos min tiurilate?“

„Kompreneble, tiu ŝlosilo li ne fidis al mi!“

„Ĉar li ankoraŭ ne posedas la ŝlosilon!“

„Aŭ — jam ne?“

„Mi sola ĝin posedas.“

Ili iris silenteme tra la stratoj. Kiam ili venis sur la bulvardon, ŝi rompis la silentadon.

„Dio mia, ĉu vi do ne povas liberigi vin de tio? Mi opiniis vin pli grandema.“

Kiel sekretario de la Viktoria-Nacia-Fondo, li alproksimiĝis ankaŭ la tiaman kronprincon Friedrich kaj lian edzinon. La princa paro konservis ĉiam por Hirth afablan rememoron, kaj preskaŭ ĉiam neniam resitis en Munĥeno, ne vizitinte lin en lia hejmo.

Mi ne volas interesiĝi je lia plua biografio, kaj nur mallonge akcentas, ke li estis fondinto de la „Münchener Jugend“ (Munĥena Juno) unue aperinta en la jaro 1896. Certe li estis unu el la plej eminentaj ĵurnalistoj. Pri lia tregga multflankeco atestas liaj diversaj verkoj, skribitaj ĉiuj per brila stilo kaj grandioza humoro, mirega literatura multscieco kaj eksterordinara sagaco. Ĉarma vorto, lin trafe karakterizanta, troviĝas je la fino de lia mallonga membiografio. Jen li skribis:

„Kiujn ajn mi surpaŝis sur la kaloj, al tiuj mi petas plej ĝentile pardonon.“

Mortante kun eksterordinara spirittreŝo je la 28-a de Marto 1916, Hirth havis la aĝon de preskaŭ 75 jaroj. Li apartenis al la malmultaj homoj opiniantaj nenion neinteresa en la mondo. Mi donas ankoraŭ kelke da vortoj el la skribo de Georg Hirth, karakterizantaj plej bone la vivkomprenon de tiu ĉi homo:

„La indo de la homo ne elĉerpigas per pretendo al tregga famo kaj potenco hereda. Antaŭeje de la tribunalo de la dankemo, nur tiu kiel inda sukcesos, kiu almenaŭ klopodis riĉe uzi la diajn donacojn de la intelekto kaj koro, de la bono kaj justo, de la amo kaj kompato, sed antaŭ ĉio de la priliberaj pripensoj.“

„Sen dogmoj ankaŭ la monismo, aŭ kiel oni volas nomi la entuziasmulon kaj batalanton por senkondiĉa naturleĝeco, ne povas ekzisti. Kiel sur ĉiuj regionoj de homa agemo, tiel en la scienco ankaŭ necesa estas firma kredo, kiu neerarigita per hazardoj de la tago kondukas la homon al la certo. La neforlasebla kriterio nepras estas, ke la nur kredita ankoraŭ ne pruvata enicivigas kiel nature necesa membro en la ĉeno de la logikaj silogismoj.“

„Dio“ estas por mi la sumo de ĉio, kio nin devigas esti bonaj kaj interne liberaj; kiu ne sentas tiun ĉi devigon, tiu ankaŭ ne havas religion, eĉ se li ŝajngas laŭeble eklezian fidelon. En ĉi tiu senĉio mi ne lasas fordisputi al mi la rajton je religio.“

(Datrigota.)

D-ro W. WINSCH.

Pri Reklamo-Arto.

Reklamo estas negoca afero, tamen ni povas paroli pri reklamo-arto. Necese ĝi rimedo por pligi la vendon de iu ajn aĵo, por akiri klientaron, por atingi pri iu ajn ideo, persono, entrepreno ktp. estas reklamo. Komerco, industrio, arto kaj scienco, eĉ politiko bezonas varbrimedojn do reklamo.

La ideo (esenceno) de reklamo estas vasta: ne sole aĵoj, gazetanoncoj, kartonoj, flugfolioj kaj eliktoj apartenas al tiu fako, sed ĉiuj ajn propaganda rimedo, ĉu prezentaĵo, ĉu buĉo. La uzo de reklamo estas malnova: la primitivaj reklamrimedoj de tempo al tempo estis pliprefektigitaj. Reklamo fari farigis speciala fakoj, al kiu sin dediĉis kapabluloj artistaj kaj verkistaj kiel varbrakuloj.

En la nuna tempo post finigo de la mond milito ĝenerale oni opiniis, ke reklamo ne plu estu necesa por komercio-aferoj, ĉar vendebaj aĵoj estis dezirataj sen demando je kvalito kaj prezo. Se iu havis iun vendeban, ne estis bezone propagande peni, ne estis necese rondirigi komerciajn volaĝistojn por akiri aĉetantojn, sed kontraŭe, ĉiu vendisto estis sulicege vizitata de aĉetantoj, do kial elspezi monon por reklamo? Balaŭdaj reklamoj kaj inter-naciej komerciaj rilatoj oni devas denove vendadi kaj aĉetadi; ĝuste por tio ni bezonas reklamo-arton. Oni devas atingi aĉetkapabluojn pri vendotaj objektoj; kiu reklamas siajn vendotajn plej efike, tiu havas la plej grandajn ŝancojn profite vendi ilin. Ĉiu celega negoco estas devigata fari propagandon. Amerikanoj, Angloj, Francoj, Germanoj ktp., ĉiuj propagandas, sed ĉiuj laŭ sia propra gusto. Laŭ reklamo oni ofte povas rekoni la ĝeneralan karakteron de nacioj. La tuta reklamo enhavas popolecan karakteron; la reklamo rebriligas la kulturstaton de la koncerna popolo.

Doni definitivan normon por la tuta reklamo ne estas eble. Ĉiam oni akomodis specon kaj manieron de reklamo al la objekto reklamota kaj al la kvalito de la klientaro ekirota. Neniaokaze en reklamo-afero oni lasu memstare decidi komerciston, nepras estas rekomendinda samtempe konsulti varbrakulojn, ambaŭ kune decidi pri la irata reklamvojo, pri maniero kaj gusto de la elektivo. Ofte reklamo-deseĝnisto estas mallaŭdata por neobonguste, nealtempe deseĝnita reklamo. Bedaŭre ofte tio okazas maljuste, ĉar eble kulpas sole la komercisto, kiu per sia potenco devigas la deseĝniston labori kontraŭkonvinkite. Komercisto decidi pri la ĝenerala afero reklamota, sed pri la maniero, pri artaj kaj teknikaj faroj oni eĉdu liberecon al la koncerna reklamfakulo, tiel certe efikaj reklamiloj estas kreataj. Oni pripensu la grandiozan gravecon de la varbesenco kaj donu al varbrakulo lian gravan pozicion. Varbrartistoj sentantaj la neceson de arta reklamo sukcesis krei varbecajn artajn reklamilojn kaj sukcesigis la komercion je vastigoj kaj negoco, do reklamo kaj arto havas internajn interrilatojn.

Cokolado kaj cigaredoj ne rilatas al arto, sed arta reklamo estas necesa por instigi aĉetantojn prefere aĉeti iun ajn specon el ili. Per bonguste farata, bone gvidata reklamo, ĉu buĉo ĉu bilde, la vendota kvanto de iu ajn artikolo certe pligrandigos. Sen tute pripensita laŭplane farata grandega reklamo ni ĉiuj ne kapablas rekonstrui la ekonomian vivadon. Ĉiutande oni devas progresiĝi, ĉu rilate al komercio, arto, scienco, tekniko ĉu politike, pro tio oni devas revivigi kaj sukcese enkonduki elikan reklamarton.

HUB. FABER.

Internacia Esperanto-Servo.

Promesojn je kunlaboro en tiu ĉi fako ni ricevis el Usono. Kanadio, Litovio, Polujo kaj Aŭstrio; sed „Monatajn Leterojn“ oni sendis ĝis nun sole el Usono. Espereble aliaj landoj baldaŭ sekvos. Samideanoj ĉiutande estas petataj traduki sekvantan leteron kaj publikigi ĝin en la nacia gazeto kun aldono de la fonto.

NIA AŬGUSTA LETERO EL USONO.

En nia lastmonata letero mi skribis iom pri vivkosto kaj antaŭdiris, ke la kosto de manĝaĵoj sendube pli altiĝus kaj ke pro la vera manko de aĉetpovo aliaj aĵoj malaltiĝus, sed ne se oni fabrikus pli.

La nunaj cirkonstancoj montras ke mi antaŭdiris pli-malpli ĝuste. Pro la neaĉeto de novaj vestaĵoj per la popolo la prezo de lano terure malaltiĝis, kaj drapfabrikejoj, kiuj funkcias nur tri tagojn de la semajno, pro la nuligo de mendoj tute ne funkcias, kaj multaj laboristoj (ĉirkaŭ dudek-mil) estas sen laboro.

Kiam la registaro oferis ĉirkaŭ 12 000 000 kilogramojn da lano, nur 6% estis aĉetata, kaj pro la nevendebleco de sia lano la ŝafposedantoj, kiuj prunteprenis monon kontraŭ sia lano kaj kies obligacioj estas nun pagotaj, petas de la Federala Banko renovigon de la obligacioj por ses monatoj, opiniante ke iamaniere ili eble povos vendi la lanon antaŭ tiam.

Spite la malkareco (sed ne malkara laŭ antaŭmilitaj prezoj) de lano, vestaĵoj nur iomete malkaras. Post kelkaj monatoj eble ili kostos malpli.

La kosto de manĝaĵoj daŭras esti alta, sed principe pro la nesufiĉeco de ŝarĝvagonoj kaj lokomotivoj, ĉar dum la milito malmultaj estis konstruitaj kaj preskaŭ neniu riparitaj, same kiel en la aliaj militintaj landoj.

Kiam mi skribis lastmonate, ekzistis fimo, ke multaj hektaroj ne estus semataj. Sed la bienistoj ne estas evitantaj de laboro. Tiu-ĉi-jare ili laboras dum la tuta tago kaj uzas petrol-kulturmaŝinojn kiam ajn eble.

La virinoj ankaŭ helpas laborante en la kampoj. Memoru, leganto, ke ili ne kutimas fermi en Usono kiel en aliaj landoj!

La mimita manko de laboristoj ne nun fimigas la bienistojn. Antaŭ kelkaj monatoj la studentoj montris, kiel facile ili povis anstataŭi la fervojistojn. La laboroficejo de la registaro Usona alvokas al tiuj ĉi studentoj, ĉar ili pli povas gajni sufiĉe dum somero en la trikkampoj por pagi siajn jarelspezojn ĉe la universitatoj, kaj ili venas are por tiele labori.

Senlaboruloj ankaŭ petas laboron ĉe bienoj. Ne ekzistas fimo por la rikolto.

Pro la alta kosto de prunteprenita mono kaj manko de kapitalo la prezo de akcioj daŭras esti malkaraj, multe pli malkaraj ol iam dum la pasintaj dektri jaroj. La procentaĵo pagata por mono prunteprenita estas nun inter 7% kaj 8%, kaj la Usona registaro devas pagi 6%, pli altan procentaĵon ol iam depost la jaro 1865, kiam ni militis inter ni.

Kelkaj firmoj kaj korporacioj bankrotis, ĉar ili havis multe da diversaj aĵoj, por kiuj ili pagis altajn sumojn kaj kiujn, pro la malaltiĝo de sia merkato, ili devis vendi je nunaj prezoj, tiel perdante sian kapitalon. Bankistoj opinias, ke sendube aliaj grandaj firmoj bankrotos; sed ili opinias, ke la plimulto komprenas, ke la nunaj altaj prezoj ne estas daŭraj. Neniu opinias, ke estos financa paniko; sed kelkaj konfesas, ke la financaj kondiĉoj ne estas tre fortikaj.

A. S. VINZENT.

FILATELIO.

(Ĉiujn novaĵojn, artikolojn ktp. oni sendu al E. Fethke, Ring 11, Oppeln, Supera Silezio, Ĝerm.)

ĈEĤOSLOVAKIO. Aperis jenaj 15 novaj PM dentigitaj: 5 hel. blua, 10 h. verda, 15 h. ruĝbruna (kolombo); 20 h. malhelruĝa, 25 h. helbruna, 50 h. purpurkolora (alegorio); 50 h. helblua (Masaryk); 80 h. violkolora, 90 h. nigra (Husano); 100 h. verda, 200 h. violkolora, 300 h. ruĝa, 400 h. bruna (mastrajo); 500 h. griza, 1000 h. bruna (Masaryk).

ĈINIO. Aperis du novaj PM: 1/2 Cent violkolora (boato); 1/2 Cent flavbruna (falĉisto).

DANZIG. Kun nigra surpreso DANZIG aperis Germanaj PM de 5, 10, 15, 20, 50 Pfg., 1.—, 1.25, 2.—, 2.50 kaj 5.— Mk.

FRANCIO. Nove aperis: 60 centimes.

HAITI-insulo. Aperis: 3 Cents d. G. oranĝa, 5 verda, 10 ruĝa, 15 violkolora, 25 blua.

HUNGARIO. Novaj „falĉisto“ kaj „parlamento“-PM kun malnova enskribo MAGYAR KIR. POSTA: Fillér 5 okroflava, 10 brunbrunvioleta, 15 violkolora, 20 verda, 40 ruĝa, 50 helverda, 60 ĉokoladkolora; Kr. 1.— blua, 2.80 malhelblua.

NORDA ŜLESVIGO. Aperis kun blua surpreso 1. ZONE PM po 2 1/2, 5, 7 1/2, 10, 15, 20, 25, 55, 40, 75 Ōre (ne Pfg.), 1, 2, 5, 10 Kr.

POLJO. Aperis 40 f. violkolora, ofic-PM po 300 kaj 600 f. Tutajo: poŝkarto surhavanta enpresitan 40 f. violk. PM. SAAR-TERRITORIO. Novaj valoroj kun surpreso SAAR-GEBIET: 50 Pfg. oranĝa-nigra, 1.25 Mk. verda, 1.50 Mk. bruna.

SUPERA SILEZIO. Kun surpreso C. G. H. S. aperis kelkaj valoroj kiel ofic-PM.

SVEDIO. La nova serio pliriĉiĝis per du novaj valoroj: 20 Ōre blua, 50 Ōre bruna.

AFORISMOJ.

Kiel Esperanto utilos? — Jen, la homojn ĝl homigos!

La barbaroj loĝas kie? — Mondmilito montras: ĉe.

Estas nur du specoj de homoj: Esperantistoj kaj barbaroj!

D-ro W. PEZLEDERER, Salzburg.

La disputo pri la landnoma sufikso.

Laŭ mia deklaro, ke ET estu ĵurnalo sendependa, libera kaj tut-Esperanta, estis por mi devige, ke mi permesu en mia ĵurnalo la uzadon de la sufikso i apud uj por landnomoj. Tio ne plaĉis al niaj konservativuloj kaj, por iom trankviligi ilin, mi skribis en n-ro 1, ke estonte mi volas uzi konsekvenca ujo, kaj io nur tiukaze, se iu sendinto de artikolo aŭ anonco postulus la presigon de io.

Intertempe la Akademio (ĉu la tuta aŭ ĉu nur kelkaj membroj?) donis la „bonan konsilon“, uzi nur la „tradician“ finiĝon -ujo; sed flanke de miaj abonantoj mi ricevis diversajn leterojn, per kiuj ili aprobas mian deklaron en la specimena n-ro pri allaso de ambaŭ sufiksaj, sed malaprobas mian sintenon en n-ro 1.

La konsilo de la Akademio pri ujo kaj io, kaj la samtema artikolo de D-ro Corret en „Franca Esperantisto“ unuflanke, ambaŭ kun iom strangan argumentoj, kaj la leteroj de miaj abonantoj aliflanke, instigis min al denova profunda esplorado de la landnoma afero, ĉar nun ankaŭ mi konsciĝis, kion aliaj eminentaj s-anoj jam delonge esitis ekkonintaj, ke jen estiĝis principa demando pri estonta ŝtoniĝo aŭ evoluo de Esperanto.

Se oni intencas objektivite prijuĝi la aferon, oni devas fari al si tri demandojn.

Ĉefa demando estas, ĉu la Akademio resp. D-ro Corret prave asertas, ke la sufikso i estas kontraŭ-Fundamenta kaj disfaligas la tutan Esperantan sistemon.

La dua demando estas, ĉu la pretendoj de la io-anoj pri la neceseco enkonduki kiel landnoman sufiksion estas rajtigataj.

Fine, tria demando estas, ĉu ne ekzistas ankoraŭ ia pli taŭga sufikso por landnomoj, kiu povus kontentigi kaj repaciĝi ambaŭ partiojn.

Ni esploru sinsekre la tri demandojn.

1. Ĉu la Akademio resp. D-ro Corret estas prava asertante, ke la sufikso i estas kontraŭ-Fundamenta kaj disfaligas la tutan Esperantan sistemon?

a) En la Fundamento mi trovas: i signifas la infinitivon, o signifas la substantivon; sekvas i'o estas la substantivigita infinitivo (simila al ad'o). Tamen mi legas en la Fundamento: io (ĉu ne i'o?) estas „quelque chose, anything, etwas“. — Konkluo: Se i'o kaj io, do tute samaj vortetoj, povas havi laŭ la Fundamento tute malsamajn signifojn, ne disfaligante la tutan Esperantan sistemon, tiam ankaŭ „io Svisa“ kaj „Svisio“ povas havi malsamajn signifojn, kaj la uzado de la sufikso i por landnomoj ne disfaligas la tutan Esperantan sistemon.

b) La Fundamento klarigas: io = quelque chose, anything, etwas; uj = io plenigata de . . . Ĉu ne Svisio aŭ Svisujo estas fakte io Svisa aŭ io Svisajo? Nur stultegulo aŭ ŝercajisto konkludos, ke „Svisio estas laktoĉokolado“ (legu la argumenton de D-ro C. en „Franca Esperantisto“). — Estas egale malkompreneble, ĉu mi diras: Mi loĝas en io Svisa (eble en ujo Svisa (eble en potu, en cigarujo aŭ a.). Male, egale kompreneble estas, se mi diras: Mi loĝas en Svisio, kaj: Mi loĝas en Svisujo!

1) Sed „Junio“ ne estas „io Juna“, nek „infanterio“ estas „io infane tera“.

ENIGMOJ.

SOLVOJ el n-ro 1.

1. Fontano, 2. Oceano, 3. Rano, 4. Titano, 5. Egoismo, 6. Negro, 7. Inĝlata, 8. Satano, 9. Timono, 10. Antverpeno, 11. Redingoto, 12. Urugano. — Forte ni staru!

a) Indigo, b) Purpuro, c) Komo — Kometo.

Ĉirono — Citro.

NOVAJ ENIGMOJ.

SILAB-ENIGMO.

al, as, e, fa, ka, kraj, la, le, le, mi, ni, no, no, no, no, o, o, o, o, po, re, ri, ro, ro, ro, u, vil.

Oni kunmetu la silabojn tiamaniere, ke rezultigas:

1. besto,

2. scienco,

3. kreskaĵo,

4. virina nomo,

5. Lingva Komitatano,

6. lando,

7. muzikilo.

La komencaj literoj de la vortoj legataj de supre al malsupre nomas la litojn de ne plu aperante, bone redaktita gazeto Esperantista.

Se al sufikso estas io aldona, Veneno tuj ekostas tre ŝata De preskaŭ ĉiu ĝento Jen en la Oriento. (Leono Funken.)

VIZITKART-ENIGMO.

C. M. ĜEJAVAROS

TOKIO

Kiun profesion havas ĉi tiu persono? (M. Butin.)

ŜERC-DEMANDOJ.

a) Kiu estas la plej danĝera juvelo por sinjorinoj?

b) Kiu estas la plej valora kiso?

(Ch. G. Stuart-Menteth.)

c) Regulo 15 de la Fundamenta Gramatiko diras: „T. n. fremdaj vortoj, t. e. tiuj vortoj, kiujn la plimulto de la lingvoj prenis el la sama fonto, estas neŝanĝite uzataj en Esperanto. Ili akceptas pri la internacia ortografio kaj gramatikajn finiĝojn.“ — Jam sole laŭ tiu ĉi klara kaj ne fordirebla regulo de la Fundamento la sufikso i por landnomoj estas plene rajtigita, ĉar ĝi estas efektive internacia: Italia, Italio, Italian, Italy (elp. Iteli), k. a. Tute same kiel: Azio, Aŭstralio, Siberio, Sifrio.

La respondo al la unua demando do estas: La Akademio resp. D-ro Corret malprave asertas, ke la sufikso i por landnomoj estas kontraŭ-Fundamenta kaj disfaligas la tutan Esperantan sistemon.

2. Sekvas la dua demando: Ĉu la pretendoj de la io-anoj pri la neceseco enkonduki i kiel landnoman sufiksion estas rajtigitaj?

La io-anoj plendas pri la tri-sencoco de ujo, kiu signifas: 1. vazo, pota aŭ s., 2. arbo, kaj 3. lando, dum la finiĝo io estus pli preciza, pli simpla kaj internacie pli facile komprenebla. Tiu ĉi plendo estas certe rajtigita; sed la plej konsiderinda argumento de la io-anoj estas la (por ne-Esperantistoj) iom stranga aspekto kaj sono de ujo kaj la nepra internacieco kaj facila komprenebleco (ankaŭ por ne-Esperantistoj) de io. Eĉ estante energia batalanto por ujo, oni ne povas nei, ke ĉe adreso, titoloj ktp. landnomoj kun finiĝo io estas preskaŭ ĉiam tuj kompreneblaj, dum kun ujo ili ofte estas enigmo por ne-Esperantistoj. Kaj Esperanto ja „ne ekzistas nur por la Esperantistoj, sed por la mondo, kaj sekve oni havas la devon ĝin plibonigi, kiam la praktiko tion postulas kaj kiam ĝi estas ebla per natura vojo“. (Vortoj de H. Hodler.)

La duan demandon oni povas do, laŭ mia opinio, respondi jese.

3. Restas ankoraŭ la tria demando: Ĉu ne ekzistas ankoraŭ la pli taŭga sufikso por landnomoj, kiu povus kontentigi kaj repacigi ambaŭ partiojn?

Oni proponis sufiksion j. Certe, al kelkaj Esperantistoj tiu ĉi sufikso ŝajnas tre agrabla kaj oportuna, ankaŭ mi ŝatas ĝin pli ol ujo kaj i, pro la akcento (vidu la artikolon de S-ano Funken en ET n-ro 1, parolo 7); sed personaj preferoj neniel povas esti kompetentaj en tiel gravaj aferoj, kiuj koncernas la tutan samideanaron, eĉ la tutan mondon. Ankaŭ sufikso j havas la mankon, ke ne-Esperantisto (ekzemple post-oficisto) ĝin komprenas (skribe) same malfacile kiel ujo. La praktiko sola devas esti kompetenta kaj decidiga por ni en la landnoma demando. Alvenas ankoraŭ la fakto, ke i jam estas multflanke uzata, dum j estas novaĵo kaj eble fariĝus nur plia sufikso ankoraŭ pligrandiganta la konfuzion.

Restas laŭ ĉi-supra argumentado nur la ebl-eco, ke la Akademio sankciu la sufiksion i, ĉar ĝi jam estas tiel enradikiĝinta en la Esperanta vivo, ke estas trege malfacile, se ne maleble, el-ŝiri ĝin.

La diro de D-ro C. en F. E., ke „neniu grava Esperantista gazeto sekvis la ekzemplon de ESPERANTO de UEA, sonas al miaj oreloj tre strange. Ĉu efektive D-ro C. konas tiel malbone la E-gazetaron, ke li ne scias, ke pli ol la duono de niaj revuoj — kaj neniel la plej malgravaĵoj — uzas aŭ permesas i? Jen mi sekvigas koncernan liston.

Gazetoj, kiuj uzas aŭ permesas i:	Gazetoj, kiuj konsekvence uzas ujo:
Esperanto de UEA.	Oficiala Gazeto E-ista.
Esperanto Triumfonta.	Brita Esperantisto.
Internacia Komercita Revuo.	(Skribas tamen: Aŭstrio.)
Esperanta Finnlando.	La Esperantisto.
Esperantista Laboristo.	(Skribas: Aŭstrio.)
Esperanto Praktiko.	Francan Esperantiston.
Germana Esperantisto.	Espero Katolika.
Literaturo.	La Espero.
Amerika Esperantisto.	La Eklezia Revuo.
Nova Tempo.	La Revuo Orienta.
Esperanto Itala Revuo.	Svisa Espero.
L'Esperanto.	Nia Folieto.
La Progreso.	Bulgara Esperantisto.
Le Monde Esperantiste.	Esperantista Voĉo.
(Skribas: Jugoslavio.)	La Studento (nektografita).
Esperanto, Bahía Blanca.	
German-Pola Esperantisto.	
Blanka Kruco.	
Juneco.	
E-Mittellungen, Graz.	
Eĉ „Scienca Gazeto“ skribis 1918: Brazilo.	

Do kion ni vidas? Ĉiuj praktikemaj gazetoj uzas aŭ almenaŭ permesas i. Nia plej grava organizo, la UEA, uzas konsekvence i, kaj la plej granda parto de la Esperantistoj same preferas i. Aliaj hezitas nur tial, apliki i, ĉar ĝi ne jam estas oficialigita. Se do Esperanto estas rigardota kiel viva n-ta lingvo (laŭ la propra opinio de la Akademio), oni lasu al ĝi la vivon kaj ne tro enkatenuigu ĝin! Kaj se mi rajtas — en mia eco kiel simpla presisto-eldonisto — mi afflanke doni bonan konsilon al la Akademio, mi konsilas al ĝi, aŭ konfesi sian nekompabilecon fari efektivan fruktodonan laboron aŭ konformiĝi al la preskaŭ ĝenerala deziro de la Esperantistaro kaj sankcii la sufiksion i per sia aprobo, ne ankoraŭ pliakirigante, sed fine ĉesigante la tute nebezonan disputon pri bagatelo, kiu jam fariĝis principa demando pri ŝtonigo aŭ evoluo de Esperanto.

Mi kun mia „Esperanto Triumfonta“ estonte agos laŭ ĉi-supraj meditadoj kaj uzos ĉe adreso kaj titoloj jam nur -io; sed al ĉiuj miaj kunlabor-

antoj mi lasos la elekton uzi tiun sufiksion, kiu plej multe plaĉos al ili, laŭ mia principo, ke ET estu sendependa de kiuj ajn, kaj ke ĝi nur respugulu laŭvere la opinionojn de la tuta Esperantistaro.

TEO JUNG.

DS. Ankoraŭ mi deziras diri kelkajn vortojn pri la t. n. landnoma „haoso“. La haoso ne devenas el la apuda uzado de ujo kaj i: tio estas nur ĝojiga variceo sed ne haoso. La haoso ekzistas sole ĉe la nomoj de la urboj, insuloj, riveroj, montoj ktp. kaj ĉe tiuj landnomoj, kiuj ricevas sian nomon ne laŭ la popolo ĝin loĝanta, sed ĉe kiuj, kontraŭe, la nomo de la loĝantoj ofte estas derivata de la landnomo, precipe ĉe la Amerikaj ŝtatoj.

Jen la sufikso i povus fariĝi vera malkonfuzilo! Ekz. ni ne scias, ĉu diri Argentino, Ĉilo, Meksiko por la lando kaj Argentinano, Ĉilano, Meksikano por la loĝanto, — ĉu Argentino, Ĉilo, Meksiko por la loĝanto, kaj formi la landnomojn per la „tradicia sufikso ujo“: Argentinujo, Ĉilujo, Meksikujo! Se ni estonte dirus konsekvence Argentinio, Ĉilio, Meksikio por la lando — ĝis la Akademio estus decidinta, ĉu la originala vorto estu la nomo de la lando aŭ tiu de la loĝanto —, kaj derivus la nomon de la loĝanto: Argentiniano, Ĉiliano, Meksikiano, ni ne farus eraron kaj evitus konfuzion.

Parolejo.

(Je libera dispono de ĉiu abonanto.)

9.

AL LA ELDONANTO DE INTERNACIA KOMERCA REVUO.

La n-ro 8/9 de via bonega revuo mi vidis bedaŭrinde nur komence de Aŭgusto. Ĝi estis por mi speciale interesa, ĉar ĝi enhavis vian kritikon pri mia ĵurnalo. Legante ĝin, mi iom seniluziĝis, ĉar post via antaŭ-annonco mi certe estis preparinta je multe pli „severa“ kritiko.

Vi konsentas, ke ET estas bonstile redaktata en facile komprenebla lingvo, eĉ vi respektas mian bonan volon kaj mian agemon; sed — vi bedaŭras la „eldonan pasion“ de la Esperantistaro kaj la senkritikan aprobon de preskaŭ ĉiuj eldonantoj. La lastan frazon (vian propran) mi tute substrekas. Ĝi nove bakita E-ismo kredas sin destinita eldoni novan gazeton aŭ novan gramatikon, traduki kaj publikigi romanon, fondi novan asocion, starigi novan „Centron Esperantistan“ ktp. Kaj la bedaŭrinda samideanaro pro entuziasmo al Esperanto acetas kaj digestas laŭeble la neriprofunde „bonsilajn“ novajn gazetojn kaj librojn aŭ alĝos al la grandioza „tutmonda“ asocio. Sed kompreneble la hodiaŭa dubindaĵo „gajtojn kaj asociojn. Kion ni vidas? Post duonjara aŭ eble iom pli longa barakado inter vivo kaj morto la gazeto aŭ asocio re malaperas, egultinte valorajn tempojn, laboron kaj monon, kiujn oni estus uzinta preferi al la subtenado de unu granda gazeto, de unu grava organizo.

Ĉu vi, s-ro eldonanto, agis laŭ tiu ankoraŭ via konvinko? Certe ne; ĉar vi estis post la milito la unua, kiu, eldonante vian IKR, konkurencis kontraŭ „Esperanto“ de UEA tiam plene sufcianta ankaŭ por la komerca fakto.

Mi konsentas, ke via revuo estas bela, bonega, konvinka; tamen ankaŭ ĝi jam de la komenco barakatis inter vivo kaj morto, ĉar ankaŭ ĝi — same kiel preskaŭ ĉiuj E-gazetoj — eliras pleje kio — same kiel preskaŭ ĉiuj E-gazetoj — eliras pleje kio — en duobla amplekso, mi ne volas tion riproci al la eldonantoj de la E-gazetoj: ili estas senkulpaĵ; ĉar la paper-kaj preskostoj tiel altiĝis, ke estas fakte neeble al la eldonantoj plenumi siajn promesojn.

Des pli salutinde devus esti, se vera fakulo — presisto jam deponit pli ol 12 jaroj kaj Esperantisto deponit 9 jaroj — entreprenas aperi ĵurnalon, kiu, unufanke, ne barakatis duonvive duonmorte sub la malfacilaĵoj de la aliaj E-gazetoj, kaj kiu, aliflanke, garantias plejparte grandan korektecon de la kompostoj. Do, se mi — kiel fakulo — diras, ke ET eliros ĉiusemajne, mi tion diras sciante, ke mi povos efektiviĝi mian parolon. „Esperanto“ de UEA en antaŭvidebla tempo ne povos aperi ĉiusemajne, ankaŭ ne, se IKR kaj ET ne ekzistus; ĉar iro aliaj estas nuntempe la kostoj! Plue, mi estas kun mia ĵurnalo tute sendependa de kiuj ajn; ĉi samideano, ĉi socio povas senĝene uzi la kolonojn de ET por esprimi sian liberan opinion en mondlingvaj aferoj. Tia sendependa ĵurnalo ĝis nun ne ekzistis; sed ĝi estas tre utila por ekdoni la efektivan opinionon de la tuta samideanaro en multaj gravaj demandoj.

Rilate al vija lasta rimarkigo pri „saĝa solidareco“ kaj pri „koncentro de la fortoj“ mi ripetos, ke ili esprimas miajn proprajn pensojn. Jam de diversaj flankoj oni proponis al mi kunfandi mian ĵurnalon kun la pli gravaj aliaj. Sed por kuniĝo estus necesa la interkonsento de ĉiu koncernato. Se tia kunfando estus ebla sur la bazo de ofta, impresformata, internacia, universala kaj sendependa ĵurnalo, mi certe ne estus tiu, kiu rifuzas la kuniĝon. Sed tiel longe, kiel kuniĝo sur la bazo ne estos atingita aŭ atingenda, mi sekvos firme kaj persiste mian idealon: la almenaŭ ĉiusemajnan, sendependan, internacian kaj universalan ĵurnalon Esperantistoj; kaj la ŝanco estas dek kontraŭ unu, ke mi irasukcesos; ĉar mi ja estas profesia presisto-gazeteldonisto!

Do, en estonteco, ricevonte pluajn n-rojn de mia „Ĵurnalo“, vi ne plu bezonos „kompai nian movadon“. Iom post iom, se ET eliros regule ĉiusemajne kun universala enhavo, sendependa kaj internacia, vi eble konvinkigos, ke mi suriris la ĝustan vojon, eble vi mem konfirmos la bezonon kaj utilon de mia ĵurnalo por la Lingva Internacia.

Kaj nun, kara samideano kaj kolego, ni ĉesigu la diskuton kaj laboru ĉiu je sia loko! La estonteco la montros, kiu de ni estis prava — eble ĝi pravigos nin ambaŭ.

T. J.

PS. Unu peton mi ankoraŭ havas: ne preterlasu sendi al mi la elironajn kaj eble ankaŭ la jam aperintajn n-rojn (deponit Februaro inkluzive) de via laŭdinda revuo. Interŝenge mi sendas al vi mian ĵurnalon, laŭ la kutimo inter la Esperanta gazetaro.

10.

SUFIKSO -JO. — ADRESOJ DE FIRMOJ. ADRESOJ DE KONTRAŬULOJ.

LA „DISTINGILO“.

Permesu, ke mi diru mian opinionon pri kelkaj enhavaĵoj de la 1-a n-ro.

Mi ĉiam malaprobis ian ajn ŝanĝon al la Fundamento; sed, ĉar granda dezirulo de ŝanĝoj pasas, mi devas esti ĉi tiom favoron al la propono de S-ro Leono Funken pri landnoma finaĵo. Verdire nek -ujo nek -io min kontentigas, dum mi trovas -jo pli kontentiga, precipe pri belsonco kaj praktikiteco en ĉiuj landnomoj.

La rubrikon „Adresoj“ iniciatitan de S-ano G. van Heek mi multe ŝatas kaj deziras, ke ĝi ampleksu ne nur komercajn firmojn, sed ankaŭ instituciojn, sociojn, ĵurnalojn, oficojn, aŭtoritatojn, eminentulojn, kiuj povas utili al nia movado.

Krom tio mi proponas alian rubrikon por adresoj de rimarkindaj kontraŭuloj, skeptikuloj, mokujoj, al kiuj allandaj E-istoj devus sendi klarigojn kaj pruvojn de nia serioza programo. Preskaŭ ĉiam tiuj malŝatuloj estas nur nesiantuloj! Ili ofte rekonas sian eraron. Por komenci tian rubrikon, mi aldonas malgrandan liston de la diritaj adresoj.

Alia demando traktinda estas tiu de la „distingilo“, la bela, senplena, glora „verda stelo“, unua signo de Esperantismo kaj frateco, unua ilo de propagando kaj de praktikiteco kaj de rekono. Ne estas Esperantisto, kiu ne kunportas la verdan stelon, same kiel kiu ne estas membro de UEA!

Mi esperas vidi la estontajn n-rojn de ET ĉiam pli belaj, pli ofaj, pli multenhavaj, pli abonataj! F. C. en P. (Italo)

11.

KONSILO AŬ ORDONO?

En la 2-a n-ro de ET skribas la Akademio: „Ĉar Esperanto estas vivanta lingvo, la Akademio havas nek la rajton nek la povon trudi al malpermeso ian ajn, sed la rajton ĝi havas kaj la devon doni konsilojn“.

Mi tute malaprobis ĉi tiujn vortojn! Nun ĉu E-isto havas la rajton paroli kun Esperantano, kiu plej bone plaĉas lin? Tio neniam estu okazinta okazanta kaj okazonta! Ankaŭ en la naciaj lingvoj ĉi tio estas permesata, kaj tio estas malpermesata per konvena institucio. Se la Akademio ne malpermesas la finiĝon -io por landnomoj, ni ĉiam ree legos ĝin. Kaj oni pripensu: Povas okazi, ke baldau io ajn ne plaĉas al iu E-isto, li proponas aligon, kelkaj aŭ multaj E-istoj enkondukas la aligon, kaj ni havas la plej grandan konfuzion, ĉar la Akademio ne malpermesas la aligon, sed ĝi nur konsilas resti fidela al la Fundamento! Se tio ofte okazos, baldau neniu komprenos la alian. La Akademio estu tre severega gardisto de la Fundamento! Ĝi permesu kaj malpermesu, sed neniam konsilu, por ke ne okazu multaj, longe daŭrantaj interdisputadoj, kiuj preskaŭ neniam havas rezulton!

K. H. WERNICKE.

12.

ĈU „SPITE“ ESTAS PREPOZICIO?

La uzo de la frazeto „spite la fakto“ de unu el vija kunlaborantoj insligas min diskuti en vija kolonoj la uzadon de „spite“ kiel prepozicio.

Mi trovas en la Fundamento de Esperanto p. 85, ke „spit“ estas radiko kaj ne prepozicio. Tamen Boirac en sia „Plena Vortaro“ diras: „SPITE: prepozicio samsignifa kiel malgraŭ“, kaj Kabe nomas ĝin: „Prepozicio kun la senco: intence kontraŭ la volo de aliaj; Por inciti la gubernistojn, la knabo sin banis spite lia malpermeso“. Kion diras Kabe pri „malgraŭ“? „Prepozicio kun la senco: ne turnante atenton al io, ne atentante ion: fari ion malgraŭ malpermeso“. Ĉu tiu faro ne estas intence kontraŭ la volo de aliaj?

En F. E. „malgraŭ“ trovigas kiel prepozicio, sen strekoto por montro de ĝi estas radikovorto; kaj estas aldonita, kiel pri „spit“ la sama ekvivalente por la Franca „en dépit de“, kaj por la Angla „in spite of“.

Se laŭ Boirac „malgraŭ“ estas „prepozicio, kiu signifas kontraŭ la volo de iu, kvankam io kontraŭstaras, spite de io aŭ iu“, kaj „spite“ estas „prepozicio samsignifa kiel malgraŭ“, estas klare, ke unu el la du prepozicioj estas superflua en lingvo, kiu celas kiel eble esprimi unu ideon per unu vorto. Por la Fundamentisto la elekto inter la du estas facila, ĉar la F. E. donas nur „malgraŭ“ kiel prepozicio kaj montras, ke „spit“ estas radikovorto.

Zamenhof uzas ambaŭ vortojn en Levitudoj XXVI, 21, laŭ ĝia tiala senco: „Kad se vi malgraŭ tio spitos Min“.

Ni ekzamenu la uzadon en niaj fundamentaj dokumentoj. F. K., 32/29. Malgraŭ tio mi volas vin morde. 129/24. Malgraŭ la diversa dialekto, oni povas 278/8. Ni penas . . . kaj malgraŭ ĉio 86/1, 213/25. . . malgraŭ ke . . . Tamen 286/24. . . spite ĉiuj argumentoj . . .

En tiu lasta frazo — la sola okazo en F. K., en kiu „spit“ estas uzata — ĉu malgraŭ ne estas egale bona?

D-ro Zamenhof uzas „spit“ kelkfoje en la Psalmaro jene:

- Ĉiujn miajn malamikojn li forspitas. X, 5.
- Mi vidis malpulon, kiu estas spitema. XXXVII, 35.
- Konduku mi sur ĝusta irejo, spite miaj malamikojn. XXXVII, 11.
- Spite miaj malamikoj liberigu min. LXIX, 19.

Ĉu D-ro Z. ne fatis en la lasta citaĵo? Spite estas adverbo, devena de la radiko spiti, kaj estas ĝuste uzata kiel adverbo-prepozicio; sed ĝi postulas la sekvon de alia prepozicio aŭ de akuzativo.

En Lingv. Resp. 37, D-ro Z. ŝajne forĝis la fundamentan faktion pri spiti. Li tie diras: „Kiam la senco tion postulas, ni tre bone povas uzi adverbajn en la senco de prepozicio; pri la formo, en kiu ni devas tion fari, mi ne konsuas. Malgraŭ tio per la unu regulo partio okazis, sed mi konsilus konformiĝi ĉiujfoje al la specialaj bezonoj de la frazo. Ekzemple: se la adverbo devenas de verbo transira (kia postulas akuzativojn), tiam ankaŭ la adverbo-prepozicio konservas tiun saman ecan kaj estas uzata kun la akuzativo (ekzemple „koncerne tion“ = kio koncernas tion, „rilate tion“ = kio rilatas tion); se la adverbo anstataŭas vorton, kiu povas ligiĝi kun substantivo nur per la prepozicio, tiam ankaŭ la adverbo akceptas post si tiun prepozicion (ekzemple „kaŭze de tio“ = pro la kaŭzo de tio, „responde al via demando“ = kiel respondo al via demando); se la adverbo estas vorto ne devena sed originala, kiu per si mem havas la senco de prepozicio, tiam ĝi, kiel ĉiu alia prepozicio, ligiĝas kun la substantivo senpere, t. e. sen alia prepozicio kaj sen akuzativo (ekzemple „spite mia malamiko“).“

Tamen en Ps. XXVII, 11, D-ro Z. uzis la formon „spite miajn malamikojn“; ĉu ne ĝuste? Aŭ la akuzativo estas bezonata aŭ ne. Lev. XXVI, 21 montras, ke spiti, estas transira; ankaŭ P. E. 1191: „Abelujojn ne incitu, ĉar estas spiti“. Mart. P. E. 126/7: „kvazaŭ spitanite la trojn de la talivero“. Klare D-ro Z. devus diri „spite miajn malamikojn“ aŭ „spite al miaj malamikoj“ = en spito al miaj malamikoj, sed pli bone „malgraŭ miaj malamikoj“.

Ni do konstatas la interesan faktion, ke Boirac, Kabe kaj D-ro Z. mem rigardas kiel prepozicion — kaj ne de radika deveno — vorton, kiu en la F. E. ne estas prepozicio. Laŭ mia humila opinio, la radiko „spit“ havas sian propran oficon. Mi havas spiton kontraŭ la uzado de spite kiel simpla prepozicio, mi parolas spite kontraŭ ĝin, kiam mi parolas pri ĝi. malice. En preskaŭ ĉiu okazo, en kiu mi vidis la uzadon de spite kiel prepozicio, oni povis egale bone uzi malgraŭ, kaj ĉar malgraŭ estas la fundamenta prepozicio supozeble kun la sama signifo kiel spite kaj laŭ mia vidpunkto pli bone kaj sen dusencoco esprimas la penson „kontraŭ la volo, aŭ ne atentante la sintendon de aliaj“, mi ŝatas kaj preferas malgraŭ kaj ĉiam uzados ĝin. Se iam mi uzos spite, mi ne uzos ĝin kiel simplan prepozicion, sed antaŭ alia prepozicio aŭ la akuzativo.

Mi estas tre kontenta, se la Lingva Komitato farus perdoĉdonan decidon pri la afero kaj fiksus la ĝustan uzadon.

W. M. PAGE, Edinburgh.